
“BJALISTOKO“ LAŬ LA PERCEPTO DE ZAMENHOF-BIOGRAFIOJ

Enkonduko: La celo de la ekzerco prezentita ĉi tie estas esplori la ĉapitrojn pri Bjalistoko, kie L.L. Zamenhof inter 1859 kaj 1873 pasigis sian vivon, laŭ la koncernaj specimenaj tekstoj el diversaj biografioj de Zamenhof – precipe tiuj de *Edmond Privat* (1920), *Ernest Drezen* (1929), *Maria Ziółkowska* (1959), *Marjorie Boulton* (1962), *Ryszard Kraško* (1972/1983), *Ito Kanzi* (1982) kaj *Centassi/Masson* (2001). Fakte ĉi tiuj biografioj estas la esencaj referencverkoj, kiuj provis, kutime en siaj unuaj ĉapitroj, priskribi ankaŭ la historiajn kaj politikajn cirkonstancojn kaj la gentan-lingvan fonon dum la vivotempo de Zamenhof. La bildo, kiun la esperantistaro ricevis pri Bjalistoko, do estas ŝuldata precipe al tiuj biografioj. Ni volos esplori, kiel la diversaj biografoj prilaboris ĝin kaj kiujn fontojn ili uzis.

Ni reaperigas tiujn tekstopartojn kun modera prinotado, kelkaj konkludoj sekvas fine de la prezento. Ĉar la kontribuo fariĝus tro longa, ni rezignas pri la karakterizado de la psikologiaj trajtoj de la gepatroj de LLZ, kiu kutime aperas kunplekte kun la priskribo de la vivo de Zamenhof en Bjalistoko en la koncerna ĉapitro. Aliflanke, la mencioj pri la judeco de Zamenhof interesos nin.

La unuan konsiderindan biografieton pri L.L. Zamenhof verkis lia frato Leono. Ĝi aperis en la revuo ‚Universo‘ en 1910 kaj estis prezentita en ‚Spegulo‘ 1/2009. Pro tio ni daŭrigas nian serion per la prezento de la biografio de Edmond Privat.

Edmond Privat: Vivo de Zamenhof“ (1920) ¹

Enkondukaj rimarkoj: Kiel Ulrich Lins en sia enkonduko al la 6a reeldono de ‚Vivo de Zamenhof‘ de Edmond Privat (1889-1962) emfazis, temas pri la unua atentinda biografio pri la aŭtoro de Esperanto, kiu aperis nur tri jarojn post la forpaso de Zamenhof. La biografio, kies tipa verkmaniero kaj stilo por Privat estas tuj rekonebla, estis kompilita laŭ la tiama stato de la konoj kaj scioj, kiujn Privat povis kolekti en la tempo, kiu estis al li je dispono (li estis ege okupata homo²); do ĝi ne estas konceptita kiel scienca verko, kun pedante notitaj fontindikoj ktp. (en iuj ĉapitroj tamen troviĝas kelkaj verkindikoj). Ĉar la verkaro de LLZ (kiel la leteroj de LLZ aŭ la ‚Originala Verkaro‘ de 1929) tiam ankoraŭ ne estis publikigita, Privat ne havis la okazon citi ĝin kaj dependis de la dokumentoj kaj klarigoj, kiujn donis la vidvino Klara, kaj aliaj parencoj. Sed Privat plurfoje renkontis persone la majstron kaj vizitis lin en Varsovio. La granda simpatio de Privat por la Zamenhofoj estas nemiskomprenoble sentebla en

¹ Privat, Edmond: Vivo de Zamenhof. Brita Esperanto-Asocio. London 1920. 104 p.

² Ni ne forgesu, ke Privat verkis ankaŭ la detalan Historion de la Eo-movado, libroforme aperintan en 1911 kaj 1927 kun gravaj kompletigoj al la biografio ‚Vivo de Zamenhof‘.

lia biografio ,omaĝo' pri LLZ, kiu povas esti konsiderata kiel la plej longa nekrologo pri la forpasinta majstro.

Kvankam la biografio estis eŭforie laŭdata de diversaj (ja sendube kompetentaj) recenzantoj kiel stile brila klasikaĵo kun daŭra valoro, iuj poste ne hezitis nomi la biografion ,Vivo de Zamenhof' ne ĉiam tute prave aŭ juste fabela rakonto, romaneto kaj simile, sur kiu estiĝis la mitologio de Zamenhof kaj kiujn postaj biografioj utiligis por aldoni torde novajn imagojn kaj interpretadojn de la aferoj.

Nesubtaksebla merito de la laboro de Privat estas la emfazo de la judeco de Zamenhof, kiun kelkaj Esperanto-aktivuloj, ĉefe en Francio, klopodis prisilentadi jam en la vivotempo de Zamenhof, kiu estis markita de forta antisemitismo.

La ĉefa problemo de la biografio de Privat kiel bazo por la Zamenhof-biografiado entute estas, ke malfacilas kontroli la asertojn, do grandparte oni devas fidi ilin, kiuj kredeble estas aŭtentikaj. En tiu senco eblas, kaj necesas, eĉ kun la skeptiko de la severa historiografo, legi la ĉapitron pri la ,Infano en Bjalistok'. Iom da historio de la regiono, de kiu Zamenhof devenis kaj en kiu li loĝis, Privat prilaboris en la plej unua ĉapitro ,La gentoj en litva lando'. Kompreneble la historio estas pli komplika ol Privat povis klarigi. Rimarkinde estas, ke en tiu ĉapitro la svisa (social-)demokrato ne hezitis klare malkaŝi sian simpatian por subpremataj nacioj kiel poloj aŭ judoj, samtempe kondamnante la ŝovinismon de la cara registaro.

La biografio de Privat pri Zamenhof havis plurajn eldonojn kaj estis tradukita al pluraj nacilingvoj.

La gentoj en litva lando

Kiam estis sesjara la knabeto Zamenhof en urbo Bjalistok, ĵus finiĝis dua revolucio³ kaj postlasis ĉie sangon, larmojn, akraj sentojn. Por disceligi la koleron de l'popolo, klopodis rusa registaro perfide ĵeti gentojn unu kontraŭ la aliaj. „*Divide ut imperes*“ fariĝis oficiala sistemo. Tia incitado estis tiom pli facila, ke ĉiu gento jam vivadis tre aparte de l'ceteraj. Ankaŭ per kondiĉoj materiaj, la registaro pliakrigis la naciajn diferencojn. Lerta leĝo liberigis vilaĝanojn de sklaveco al termastroj, sed samtempe lasis ilin sen ia propra kampo. Tial ili devis tamen pagi luon per laboro sia, kaj barakti pli ĵaluze kun la riĉaj posedantoj. Ĉar la mastroj estis polaj, dum litovaj aŭ blankrusaj restis ĉiuj kamparanoj, gentajn sentojn jam venenis la disputo.⁴

³ Temas pri la januara ribelo (Powstanie styczniowe) kontraŭ la rusa reĝimo en Kongresa Pollando en 1863/64. Ĉi tiu ribelo, lanĉita precie de polaj nobeloj, okazis precipe kiel partizana batalo kaj estis disbatita en aprilo 1864.

⁴ Ĝis 1795, kiam la Pola-Litova Respubliko estis dispartigita inter Ruslando, Prusujo kaj Aŭstrujo, la lando „de du popoloj“ estis dominata de la pola ento, reprezentata la nobela elito (t.n. ŝlaĥto, magnatoj), kiu posedis kastelojn kaj latifundiojn, urbojn kaj vilaĝojn, ekzemple Bjalistokon. Samtempe tiu reganta ,klaso' konsideris sin la pola ,nacio' (laŭ iu teorio: ŝlaĥtano/magnato = katoliko = polo), al kiu apartenis ankaŭ la ekleziuloj, sed ne la urbanoj kaj kamparanoj. Litovaj, blankrutenaj kaj ukrainaj nobeloj grandparte kunfandiĝis kun la polaj. Por kompreni la situacion de la poloj en tiu tempo indas fari jenan klarigon. Post 1795 estis provoj integri la polan nobelaron, kiu daŭre estis forta en la litovaj-rutenaj gubernioj, kaj kiu povis parte konservi siajn privilegiojn kaj posedaĵojn, en la sistemon de la cara aristokratio. Ĉi tiuj provoj ne tute sukcesis, ne nur ĉar tiuj du aristokrataj sistemoj ne estis kongruaj, sed ĉar la pola-rusa antagonismo restis konservata. Tamen, en la 70-80aj jaroj en la iama Litova Grandduklando 14 grandaj magnataj familioj (precipe Potocki, Radziwiłł, Pusłowski, Tyszkiewicz) daŭre posedis unu kvaronon de la grundo, kaj en 1905 80% de la iama nobela grundo estis en la manoj de la nobeloj. La iamaj mezepokaj litovaj nobeloj intertempe poliĝis, la etnaj litovoj restis grandparte

Pli malfrue renaskiĝis en la lando movado nacia de Litovoj, kies literaturo kaj aparta patriotismo refloris kun fervoro. Tion baldaŭ persekutis Rusoj kaj maŝatis Poloj, pro suspekto kaj ĵaluzo. Pli diabla ruzo estis cara politiko rilate al Hebreoj. Ilin oni pelis okcidenten el diversaj partoj de Ruslando, per ĉiaj leĝoj kaj reguloj, kun la celo superŝuti polajn urbojn kaj malfortigi reziston. Kiel ŝafaro forvipita, miloj da Hebreoj malfeliĉaj enloĝadis en Polujon ĉiujare.⁵ Edukitaj ruse, fremdaj al kutimo kaj al lingvo de la lando, komercemaj, baraktemaj por ne morti pro malsato, ili estis ĉiel abomenataj de la pola societo kvazaŭ grava malhelpaĵo al defendo kontraŭ Rusoj. (...) ⁶ Sur litva tero⁷ kvar gentoj malsamaj loĝadis en urboj, kun celoj kontraŭaj, kun lingvoj diversaj, kun kredoj malamikaj. De strato al strato ja regis malfido, suspekto, sur placoj ofendo ĉiutaga, venĝemo, persekuto kaj malamo. Sur tiu tero malfeliĉa naskiĝis Zamenhof. (...)

Infano en Bjalistok

De la patrino la koro, de la patro la cerbo, de la loko la impresoj: jen tri ĉefaj elementoj en la formado de Zamenhofa genio. (...)

La knabo ja vidis la faktojn ĉirkaŭ si en stratoj Bjalistokaj:

Preter la fenestroj de la ligna domo Zamenhofa, sur la strato Verda,⁸ pasis aro da Hebreoj kun la tipaj longaj barboj.... Al vizaĝoj jen celtrafas neĝaj kugloj en pafado.

kampanoj, same kiel la blankrutenoj (aŭ blank- aŭ belorusoj, kiuj estis nur 12% en la urboj de la nordokcidentaj gubernioj), kies lingvoj kaj kulturoj estis grandparte malpermesataj en la 19a jarcento. Iu eta meza klera tavolo kreigis. Tiutempaj observantoj raportis, ke la blankrusoj estis la sola slava popolo, kiu ne havis antisemitismajn sentojn kaj esprimmanierojn (verŝajne pro kompatoj kun ili, ĉar ambaŭ, kaj judoj, kaj blankrusoj estis malriĉuloj). La judoj, kiuj enmigris en la mezepoko en Pollandon kaj Litovujon, estas tute aparta kazo. Ili havis nek nobelajn dinastiojn (nur rabenojn kaj klerulojn), nek kunfandiĝis kun aliaj gentoj, nek absorbiĝis, nek asimiliĝis (kun esceptoj, ekzemple okaze de konvertiĝo al la katolika kredo). En la tempo de Zamenhof la judoj formis la plimulton (60-70%) de la loĝantaro de Bjalistoko, dum poloj, rusoj, germanoj k.a. la malplimulton. En la 19a jc en Kongres-Pollando okazis diskuto, ĉu eblas integri la judojn en la polan nacion, sed tiu ideo fiaskis. Tiel en la Ruslanda Regno la „pola demando“ restis aktuala, same kiel la „juda demando“, la „rutena (belorusa) demando“ kaj la „litova demando“, ĉiu kun siaj specifajoj.

⁵ Temas ĉefe pri hebreoj/judoj fuĝintaj post pogromaj incidentoj kaj alispecaj diskriminacioj el slavaj vilaĝoj.

⁶ Efektive, etnaj poloj konsideris la judojn helpantoj de la carista reĝimo.

⁷ Bjalistoko troviĝis sur la lit(o)va flanko de la iama Pola-Litova Regno (kiu estis likvidita en 1795). Pro tio LLZ konsideris sian patrujon „Litovujo“, due ĉar, ligite kun tio, li apartenis al la lit(o)vaj judoj, kiuj diferencigis diversrilate de la polaj judoj. En la vivotempo de LLZ Bjalistoko apartenis al la gubernio de Grodno, kiu situis ekster la Pola Reĝlando (kiu estis protektorato de la caro). De iu terminologio, la okcidentrusaj gubernioj estis konsiderataj ankaŭ kiel blankrusaj.

⁸ Laŭ esploroj de N.Z. Maimon, aŭtoro de „La kaŝita vivo de Zamenhof (Tokio 1978), la naskodomo de Zamenhof staris en la juda parto de la urbo, ĉe strato nomata jidlingve Jatke-gas (strato de viandbutikoj). Ĝia pola nomo estis Ulica Żydowska, ne Ulica Zielona (Verda Strato), kiu laŭ lia esploro situis en alia parto de la urbo. Sed en sia libro „Historio de Esperanto-movado en Bjalistoko“ (2003) Zofia Banet-Fornalowa kontestas tiun „teorion“ de Maimon, baziĝanta sur la rezultoj de studoj de bjalistokaj historiistoj, laŭ kiuj ekzistis du apartaj stratoj: Zielona kaj Jatki, kiuj koincidis en urbomapo de 1919, kie tiuj stratoj nomiĝis Zamenhofa kaj Żydowska. Banet-Fornalowa, kun Tomasz Wiśniewski, supozas, ke la strato Jatki havis ankaŭ kiel duan nomon Zielona. Pliajn klarigojn vd. sur p. 17 (Maimon) kaj 15 (Banet-Fornalowa). Alia afero estas, ke la naskodomo staris evidente ĉe la stratangulo Żydowska/Biała (vd. Ziolkowska 1959), vd. foton en „Vivo de Zamenhof“, 6a eld., p. 31. Ĉirkaŭ la tempo de la unua mondmilito kaj poste en la zamenhofa dometo, kiu troviĝis en sufiĉe mizera stato, loĝis teretaĝe iu Szturmakiewicz, kiu prizorgis la Memorlibron pri Zamenhof, kaj en la unua etaĝo loĝis iu horloĝisto kun

Frapon sub okulo. Sangas vango. Plendas maljunulo.... „Ne bleku, judaĉoj! hundoj!“ krias knaboj el kristana gento, kaj diskuras for, mokante judan lingvon nekonatan: „Hra, hre, hri, hro, hru.“ Tion ridas kaj aplaŭdas rusa leŭtenanto: „Formarŝu de l'trotuaro, vi, raso de ŝtelistoj!...? kaj kraĉas oficiro pro malŝato.

Sur vendoplaco moviĝas la popolamaso. Bruadas paŝoj kaj paroloj en zumado laŭta. Brilas koloroj inter korboj kaj legomoj: verdaj ŝaloj de virinoj el kamparo litva, ŝafaj peltoj, grizaj vestoj de soldatoj, manteloj kamelharaj, bluaj uniformoj de la rusaj oficistoj, blankaj zonoj, ruĝaj kolumoj, oraj agloj, arĝentaj ornamaĵoj.... Disputas vendistinoj kun germana marĉandulo. Alkuras homoj. Ariĝas videmuloj. Ĝendarmoj intervenas. Jen plendas la virinoj en dialekto litva. Policanoj ne komprenas. „Ruse parolu!“ minacas la oficiro, „nur ruse, ne lingvaĉe!“ ĉi tie estas rusa lando!...“ Protestas Polo el amaso... Kie?... Jen la viro. Jam lin kaptas la ĝendarmoj. Tremas ĉeestantoj, eĉ nevole. Inter tranĉaj bajonetoj li formarŝas, areстите. Silentas vilaĝanoj. Per saluto ĉiuj Poloj honoras la martiron, sed Germanoj kaj Hebreoj ne forprenas sian ĉapon. „Kam li ĉesos nin insulti“, murmuris longbarbulo. Kolero fajras en okuloj polaj, mokemo en la rusaj.

Kion scias tiuj homoj unuj pri l'aliaj? Ke ankaŭ ili havas koron, konas ĝojon kaj doloron, amas hejmon kun edzino kaj infanoj? Eĉ penso tia ne okazas. Ekzistas nur Hebreoj, Rusoj, Poloj, Germanoj... ne homoj, sole gentoj. En sia domo ĉiu akceptas nur samgentanojn. Kun malbeno de l'gepatroj forpeliĝas el la hejmo pola junulino, se al Ruso ŝi promesis fidon. Pri Litovoj oni ridas: „Estas ja nur vilaĝanoj!“ Ilia poezio kaj nacia revekiĝo? Laŭ Poloj „intrigo rusa“, laŭ Rusoj „germana pagitaĵo“. Eĉ ion pli neniŭ scias pro lingvo malfacila. Pri Hebreoj rakontiĝas strangaj misteraĵoj ĉe vespera babilado inter slavaj flikistinoj. „Malaperis bubo du tagojn antaŭ juda Pasko. Sur la pordo sinagoga vidiĝas makuleto ruĝa sub skribaĵo nelegebla. Kiu povas ja kompreni la hebrean literaĉon? Terure ĝi aspektas... Ankaŭ strange ŝajnis la rigardoj de l'amaso juda sur ŝtuparo de la sinagogo. Ĉu Hebreoj ne mortigus bubojn por havigi sangon laŭ kaŝita rito? Por ili la panisto kuiras kukojn ja misterajn...“ Tiel kuras murmurado. Poste bubo troviĝas, sed vastiĝis jam la famo kaj efikis en spiritoj.

Pri tiaj kalumnioj indignis jam knabeto Zamenhof en Bjalistok. Kion fari, por ke homoj ne eraru tiel abomene? El tiaj kredoj kaj incitoj rezultas iam veraj katastrofoj.

En 1925 aperis ĉe Heroldo de Esperanto 'Galerio de Zamenhofoj' de Edvardo Wiesenfeld, 40-paĝa broŝuro kun 19 unikaj fotoj, diversaj notoj pri la anoj de la zamenhofa familio kaj aliaj tekstoj, inter alie la paroladoj dum la enteriga ceremonio por L.L. Zamenhof.

la nomo Wajnsztok. Aktualis eĉ la ideo de Esperanto-muzeo, sed ĝi restis neefektivebla. La origina ligna domo estis malkonstruita en 1953 (laŭ Banet-Fornalowa), sed laŭ Maimon en 1959, spite al protestoj de e-istoj. Dum la nacisocialisma regado la strato troviĝis ene de la juda geto. Ankaŭ hodiaŭ tiu strato nomiĝas zamenhofa.

Ernest Drezen: Zamenhof (1929) ⁹

Enkondukaj rimarkoj: Alia elstara sciencisto-intelektulo, kiu aliĝis al la Esperanto-movado (en 1910) nomiĝis Ernest Drezen (1892-1937), latvo,¹⁰ rusiano, poste ŝtata funkciulo en Sovetunio. En 1918 li membriĝis en la komunista partio. En la Esperanto-movado li famiĝis kiel prezidanto de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) kaj kiel kverelanto kun Eŭgeno Lanti de SAT, fondante propran Internacion de Proleta Esperantistaro. Kiel hobia interlingvisto Drezen verkis la unikan ‚Historion de Mondolingvo‘ (1931), kiel hobia movadhistoriisto li redaktis ‚Analizan Historion de la Esperanto-Movado‘ (1931), kiel hobia lingvisto li kompilis ‚Skizojn pri teorio de Esperanto‘ (1931), kaj kiel biografo li skribis ankaŭ bioideologian studon pri L.L. Zamenhof (1929). La ĉi-lastaj verkaĵoj interesas nin ĉi tie. En diversaj rilatoj Drezen similis al Privat: politike-ideologie interesata kaj socie-organize engaĝata sciencisto, kun la diferenco ke kiel komunisto Drezen argumentis el la vidpunkto de la marksisma doktrino, dum Privat estis ‚nur‘ socialdemokrato (nefanatika). Ĉi tiun marksismon li aplikis ankaŭ al la percepto, interpretado kaj eksplikado de la zamenhofaj biografio, pensmaniero kaj mondkoncepto. La hilelismmon-homaranismon Drezen rifuzis kun la riproĉo al la adreso de la kreinto de Esperanto, ke tiu atentis nur la lingvaj kaj religiajn aspektojn, sed ignoris la politikajn, ekonomiajn kaj la klasbatalon. Ĉi tiu sinteno de Drezen, kiu logike devis esti kontraŭcarisma, esence influis liajn verkojn kaj kaŭzis, ke ankaŭ la studo pri Zamenhof ricevis tordiĝon en la marksisma vojmonro, sed oni konsciu en kiu lando kaj tempo Drezen tiam troviĝis. Por sia propra verkaĵo Drezen evidente baziĝis almenaŭ parte sur la libro ‚Vivo de Zamenhof‘ de Edmond Privat, el kiu li ĉerpis laŭsence frazojn pri subpremataj popoloj, malriĉaj homoj kaj laboristoj. Sed Drezen referencis ankaŭ al la biografio, kiun postlasis Leono Zamenhof,¹¹ kie estas notite, ke lia frato interesiĝis pri diversaj sociaj demandoj. Post analizo de la zamenhofa idearo, Drezen konkludis, ke Zamenhof nenion komprenis pri sociaj kaj politikaj problemoj, ĉar neniu de lia ĉirkaŭaĵo povis klarigi al li la verajn kaŭzojn de la nacia kaj ekonomia subpremo, de la intergenta antagonismo kaj de la reciproka malamo inter la etnoj. Pro tiu nekompreno de la sociaj problemoj Zamenhof tiris la malĝustajn konkludojn kaj mem kontribuis al tio, ke lia „socia idearo“ ne trovis akcepton.

Ĉar Drezen estis mortpafita de la stalinistoj en 1937, liaj persono kaj verko fariĝis en la komunismaj landoj dum longa tempo tabuaj. Nur en 1957 Drezen estis rehonorigita, kiam ankaŭ la Esperanto-movado en la sovetia bloko denove rajtis ekspiradi.

Por iom sentigi liajn drastajn vidpunktojn pri la Zamenhofa interna ideo, esperantismo kaj homaranismo, n aldonas kelkajn pliajn frazojn de Drezen pri tiuj temoj.

La bibliografio aldonita al tiu studo entenas i.a. verkojn de Descartes 1897; Esperantista dokumentaro, kajero XXVI 1914; Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto 1903; Ria de Baulmes 1788; Rebouvier C. 1855; [Stojan P.] Ribaulb O.D. 1927, L.N. Tolstoj, Pri la perforto, milito kaj revolucio 1928; Wiesenfeld, Galerio de

⁹ Drezen E.: Zamenhof. SAT Leipzig 1929. 49 p.

¹⁰ Latve: Ernests Drēziņš. Detalan biografion vd. en: Drezen. E.: Historio de la Mondlingvo. Kvara Esperanto-eldono redaktata kaj komentata de S.N. Kuznecov. Moskvo 1991, p. 3-40.

¹¹ vd. *Spegulo* 1/2009, p. 14-20.

Zamenhofoj 1925; [Zakrzewski A.] Adam Z., Historio de Esperanto 1887-1912, 1913; Zamenhof L., Originala Verkaro 1929; Unua Libro por rusoj 1887.

Zamenhofa junaĝo

La karaktero, la pensmaniero kaj la tuta personeco de Ludoviko Zamenhof – estonta aŭtoro de la lingvo esperanto – formiĝis dum lia junaĝo sub influo de tiu socio kaj tiuj politike-ekonomiaj kondiĉoj, kiuj estis karakterizaj por rusa imperio kaj okcidentaj ĝiaj regionoj dum la dua duono de la dekaŭa jarcento.

Ludoviko Zamenhof naskiĝis la 15an de decembro 1859 en Białystok de gepatroj hebreaj.

En Białystok 80% da loĝantoj estis hebreoj. Aliaj 20% da loĝantaro apartenis al rusoj, poloj, germanoj.

La ĝenerala politiko de la cara registaro en la okcidenta lando kaj speciale en la tiel nomata Pola Reĝlando konsistis en instigado malamika de unu nacio kontraŭ alia. Subpremataj en libera disvolvo de sia nacia vivo kaj kulturo, poloj kaj hebreoj helpis al tiu subpremado per reciprokaj malamikaĵoj. Pleje suferis nature hebreoj.

Dum la infanecaj jaroj de Ludoviko (1863-1865) okazis la lasta Pola revolucio, sufikita plej kruele de rusaj ĝendarmoj kaj regimentoj.

(...)

La tuta Zamenhofa ideologio ensorbita de li en la hejmo, lernejo kaj sur stratoj de Białystok kaj Varsovio estis tiu de la nacie kaj ekonomie premita kaj ekspluatata etburĝaro de polhebreaj urbetoj pollandaj.

Privat rakontas: „Pri laboristoj, pri malriĉaj homoj... gimnaziano Zamenhof pensadis pli kaj pli. En rondo familia li ŝatis legi laŭte el versaĵoj de poeto rusa Nekrasov“ – poeto de mizero kaj sufero; kaj „dum tuta vivo Zamenhof amis la popolon laboreman kaj preferis loĝi en kvartaloj ĝiaj for el mondana societo“.

Frato de Ludoviko, Leono Zamenhof, rakontas en verketo El biografio de L. Zamenhof: „Ankaŭ dum la jaroj gimnaziaj lin multe interesis diversaj sociaj demandoj.

De plej junaj siaj jaroj li revis pri solvado de tiaj problemoj, sed plej multe lin interesis la problemo de diversnaciaj interrilatoj. Ĝi instigis lin ekprovi kreon de lingvo neŭtrala internacia“.

La familio kaj la ĉirkaŭanta lin socio ne povis doni al Ludoviko ĝustajn klarigojn pri la kaŭzoj de la ekzistanta nacia kaj ekonomia subpremo, pri la veraj kaŭzoj de nacia batalado kaj malamikemo reciproka.

La patro-cenzuristo verŝajne eĉ zorgis ke en la cerbon de lia filo ne trafu iuj danĝeraj ideoj. (...)

Rezulto estis, ke tiujn problemojn sociajn tre gravajn, Ludoviko klopodis solvi memstare. Li ricevis ideon, ke la kaŭzo ĉefa de intergenta malamikemo estas diferenco de la lingvoj. Jam tre juna li venis al tiu ideo; kaj en la jaroj maturaj tiu ideo akiris ĉe li ĉiam pli gravan rolon. Pli malfrue, kiam li povis ekkoni ankaŭ aliajn pli realajn konceptojn sociologiajn, tiu ĉefideo de lia vivo akiri por li jam tian gravecon, ke ĝi ĉiujn aliajn pensojn forŝovis malantaŭen.

Do la tuta idearo de Zamenhof estis ligita kun la problemo pri Lingvo Internacia, kaj tial Zamenhof neniam sukcesis vidi iujn aliajn solvojn por la „malbenitaj problemoj sociaj“ ol tiuj solvoj, kiuj metis sur la unuan planon la ideon pri Lingvo Internacia.

Tia konceptaro de Zamenhof havis eĉ certan utilon. Tre verŝajne nur dank' al ĝi Zamenhof pripensis ĝis la fino, ellaboris ĝis la fino kaj sukcesis realigi sian revon pri Lingvo Internacia.

La problemoj fakte pli gravaj restis por li ĉiam flankaj, kaj tuta lia atento, tuta streĉo de lia menso estis ĉiam direktita nur al unu – por li senlime grava punkto.

Zamenhof konsideris sin kiel pioniro, kiel profeto de tiu ideo. Li antaŭvidis multajn obstaklojn, sed li kredis al sia praveco kaj al fina triumfo de sia ideo.

Tial li skribis:

„La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom moko kaj atakoj, la unue renkontita tre malmulte lerninta bubo rigardas ilin de alte kaj diras al ili, ke ili okupas sin je malsaĝaĵoj...“.

Kaj:

„La homoj miras, kiamaniere en nia praktika tempo povas aperi tiaj malsaĝaj fantaziuloj...“

Sed tempo forpasas, kaj la hieraŭaj ideoj primokataj iom post iom fariĝas ĝenerale akceptitaj. Kaj Zamenhof sukcesis ĝisvivi grandajn triumfojn kaj gravajn akceptojn, se ne por sia „socia idearo“ do tiam por la praktike de li solvita problemo pri Lingvo Internacia.

La interna ideo de esperantismo

(...) Malsukcesis tiuj sociaj ideoj, kiujn Zamenhof de la komenco mem intime ligis kun sia lingvo. (...)

Sendube erara estis la ĉefa pretendo de la zamenhofa memuaro, ke „ne kaŭzoj ekonomiaj kreas la intergentan malamon“.

Ĝuste tiuj kaŭzoj ĝin kreas. La ekonomia konkurado de diversnaciaj financistoj kaj entreprenistoj estas ĉiam prezentata kiel konkurado inter nacioj kaj gentoj. (...)

Same eraris Zamenhof, kiam en 1913 li asertis, ke „lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de malamo inter homoj“.

(...)

Zamenhof blindigita de siaj ideoj, ofte ne povis rimarki la ekzistantajn kontraŭdirojn inter siaj asertoj kaj la vivo reala.

(...)

Neniun vorton diris Zamenhof pri tio, ke la lingvo mem estas produkto de certa socio, de certaj formoj de mastrumado kaj de socia produktado. La ideoj pri la lingvo, unuiĝinta kun la nebula „interna ideo de esperantismo“ superregis en menso zamenhofa ĉion alian.

(...)

Tial anstataŭ nebula esperantismo li decidis fondi pli klare difinitan filozofie-socian movadon homaranisman.

(...)

Tiujn ĉi ideojn zamenhofajn, kiuj kapablas nur fuŝi realan komprenon de la ekzistantaj soci-fortoj, necesas repuŝi plej energie.

(...)

En la 'Enciklopedio de Esperanto', redaktita en 1933 de L. Kökény kaj V. Bleier, estis publikigita biografia artikolo pri L.L. Zamenhof, kiu baziĝis ĉefe je la letero al Alfred Michaux de la 21a de februaro 1905. Sed ho ve, frape en tiu biografia artikolo estas, ke

en ĝi mankas la aludoj pri la hebreeco de Zamenhof, do ankaŭ la ĉi-koncernaj alineoj el la letero al Michaux estis forstrekitaj.

Kiel konate, ĉi tiu letero enhavas la gravajn informojn de Zamenhof pri la tiam malfavora situacio en Bjalistoko.

Aliloke, sub la litero B, la ‚Enciklopedio de Esperanto‘ inkluzivis apartan mallongan artikolon pri Bjalistoko, en kiu estas inter alie skribite, ke „la diverslingveco de la loĝantaro kaj la ofte ne amikaj interrilatoj inter la diversaj gentoj donis al Zamenhof la impulson krei Lingvon Internacian.“ Krome estas menciite, ke sur la (tiam ankoraŭ konservita) naskodomo de Zamenhof pendas marmora tabulo, kaj ke en la domo mem troviĝas ora libro, „en kiun enskribiĝas ĉiuj vizitantoj“.

En 1948 aperis ĉe SAT la ‚Leteroj de L.-L. Zamenhof‘. Temis pri duvoluma libro redaktita de Gaston Waringhien. Unuafoje estis publikigita la plena letero de Zamenhof al Michaux de la 21 II 1905 en la unua volumo de tiu eldonajo.

Maria Ziółkowska: Doktoro Esperanto (1959)¹²

Enkondukaj rimarkoj: En 1959 estis festita la 100a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof kaj organizita la 44a Universala Kongreso en Varsovio, Pollando. Okaze de tiu jubileo aperis ampleksa biografio pri L.L. Zamenhof, kiun verkis la pola aŭtorino Maria Ziółkowska¹³ en la pola lingvo. La Esperanto-traduko, kiu aperis sur la maldekstra flanko de la libro, estis prizorgita de Isaj Dratwer, juddevena pollandano, kiu sub la premo de la neo-antisemitismo elmigris al Israelo.

Unuafoje estas menciitaj en Zamenhof-biografio iom pli konkretaj indikoj pri la loĝantaro de Bjalistoko. Sed kelkaj aferoj estis elpensitaj kun la celo fari la tekston pli interesa: la bjalistoka bazarplaco, sur kiu ludis la knabo Zamenhof; la kvinakta tragedio, kiun Zamenhof ja menciis en sia letero al Michaux, sed sen la Babelturo, kiu staris sur la vendoplaco de Bjalistoko; la vortekzemploj de la unua lingvoprojekto de LLZ (en la tempo de lingve uniwersala) kaj fine la tuta konversacio inter Aŭgusto Orzechowski, Pinagel, du fikciaj personoj, kaj Marko Zamenhof, la patro de LLZ.

Koncerne la judecon de Zamenhof lige kun la libro ŝajne okazis diskuto tiam, en 1959 en Pollando: Andrzej Rajska, prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, kiu ŝajne mem estis judo, evidente celis atingi, laŭ inspiro de Edmund Fethke, ke la judeco de Zamenhof estu prefere flankenŝovita.¹⁴

En sia ‚La kaŝita vivo de Zamenhof‘ N.Z. Maimon kiel pri tiaj aferoj sentema judo suspektis en la libro de Ziółkowska „nedecajn, antisemitajn tendencojn“ kaj konsideris ŝian biografion „nehonesta“, ĉar oni celis karakterizi judojn kiel monaviduloj (ekzemple la patron de LLZ mem), kiel financaj ŝarkoj, ktp. . Malgraŭ tio Maimon, kiu esploris judajn temojn lige kun Zamenhof en la 1950aj jarojn por la nica literatura

¹² Ziółkowska, Maria: Doktoro Esperanto / Doktoro Esperanto. Wiedza Powszechna. Varsovio 1959. 331 p.

¹³ Biografiajn indikojn pri Ziółkowska mi ne povis trovi, sed iu eldonejo en Pollando sciigis min, ke ŝi vivas en Varsovio.

¹⁴ Vd. Van Dijk, Ziko: La Asocio. Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA, 2008, p. 246.

revuo, konfesis, ke el la ĝistiamaj LZZ-biografioj nur Ziółkowska enkalkulis la biblian influon ĉe Zamenhof.

La libro de Ziółkowska pri Zamenhof estis tuj tradukita en la francan lingvon (3a eldono 2005), kaj en 1975 Esperanta Meksika Junularo eldonis hispanlingvan tradukon.

Ĉe la strato Zielona

(...)

Okazis tio [la naskiĝo de LLZ] en Bjalistoko, negranda urbo, kuŝanta tuj post la nordorienta limo de la Pola Reĝlando.¹⁵ Malnovaj stratoj, kiel Warszawska, Lipowa, Niemiecka, Wasilkowska, Kleindorf,¹⁶ vendoplaco kun bazaro kaj horloĝa turo, aspektis sufiĉe kontentige. Sed la novaj stratoj – Dio gardu! Mallarĝaj, kurvaj, fiodoraj. Lignaj dometoj kaj ĉiam pli multnombraj fabriketoj, senplane konstruitaj respeguliĝis en grandegaj kotaĵoj, marĉoj. La rivereto Biała, nomita malŝate „Lavakveto“, kiu formis meze de la urbo la sufiĉe imponan lagon, eligis netolereblan fetoron. Ĝian avaran, malviglan akvofluan kovris ŝaŭmpelto de fabrikaj kaj urbaj defluaĵoj.

Malgraŭ sia laboro en multaj produktoj de ilaroj, drapejoj, teksejoj, tanejoj, la loĝantaro vivis malriĉe, en tre primitivaj kondiĉoj. Malbela estis tiu urbo kaj malgaje pasis en ĝi la vivo. Eĉ malfacile estis kredeble, ke al la caro Aleksandro I iam traveturanta tra Bjalistoko ekplaĉis elekti ĝin kiel sian someran rezidejon. Vere la palaco kun ĝardenoj estis imponega, ĝuste dank’ al ĝi Bjalistoko akiris la nomon de Versajlo Podlaski, kaj la malpura urbo restis ja por la plebo.

Naciaj kvereloj ankoraŭ pli profundigadis la malbonsorton de bjalistokanoj. La tridekmila loĝantaro de la urbo konsistis el tri mil poloj, kvar mil rusoj kaj blankrusoj, kvin mil germanoj kaj dekok mil hebreaĵoj.

Verda, ligna dometo de Zamenhofoj staris ĉe angulo de stratoj Zielona¹⁷ kaj Biała. Ĝi estis malbela kun malgranda kota korteto, dividita de la aliaj per barilo pli simbola ol materia. Kiel ornamaĵo de tiu ĉi korteto servis acero ĉiujare tro frue folisenigita de raŭpoj, nomita la hunda acero, pri fiziologiaj misterioj, aplikitaj de kvarpedaj amikoj de homo.

Ĝuste en tiu ĉi dometo forpasis infaneco de la juna Zamenhof, al kiu oni donis du antaŭnomojn Ludoviko Lazaro. Malgraŭ la malkvieta kaj malfacila tempo de la januara ribelo, ĝi tamen ne estas malgaja infaneco.

Neniu vere rimarkis en Ludoviko signojn de granda homo, kian en sia animo de la unua tago vidis la patrino. Eĉ scipovo uzi kelkajn lingvojn: polan, judan, rusan, blankrusan kaj germanan en la kvina vivjaro en la naska Bjalistoko ne indus lin fari mirakla infano.

(...)

Plenaĝuloj parolis ekskluzive en sia gepatra lingvo opiniante, ke uzado de iu alia atestas pri manko de nacia fiero kaj signifas kapitulacion antaŭ la aliaj nacioj loĝantaj en la urbo.

¹⁵ Ĉi tie estas aldonita piednoto kun la teksto: *Rimarko de la tradukinto*. Parto de Polujo troviĝanta tiam sub la rusa regado.

¹⁶ Novaj informeroj.

¹⁷ Pri tiu nomo vd. noton 7 en la ĉapitro pri la biografio de Privat.

En Bjalistoko onu uzis diversajn lingvojn: la polan uzis ĉefe inteligentularo. En la metiista urboparto regis la germana. En la komerca kvartalo – la juda. Alveturantaj al la bazarilo vilaĝanoj parolis prefere blankruse. La rusa estis ĉi tie la ofica lingvo. (...) ¹⁸

Ludoviko kiel „granda kaj saĝa knabeto“, lasita al sia memstareco elektis al si por amuziĝoj – je aflikto de la gepatroj – la plenuman bazarplacon. ¹⁹ Estis tie multe pli interese ol sur la korteto, kie la sola allogaĵo estis la malbonodora stumpo de la kripla arbo, sur kiun eventuala oni povis surgrimpi, kaj kie maljuna domgardisto ne povis trovi komunan lingvon kun la infanaro, kio esprimiĝis precipe per helpo de rimena zono aŭ minaca balailo.

Sur la bazarplaco estis svarme, multkolora, brue. Inter bazarbudoj amasiĝis revendistoj, komercistoj, aĉetantoj, rusaj soldatoj kaj oficistoj, almozuloj, petoluloj, infanoj... Grizaj vilaĝanaj kiteloj kaj ŝafpeltoj miksiĝis kun pitoreskaj vestaĵoj de urbaninoj, soldataj kaj oficistaj uniformoj. Variiĝis en la suno purpuraj galonoj, blankaj rimenzonoj, oraj agloj, arĝentbrilaj epoletoj. Super korboj kun legomoj kaj fruktoj, super siteloj kun fiŝoj, post la bazarbudoj kun fromaĝo, ovoj, kolbasoj sidis grasaj revendistinoj kaj maldikaj blankrusaj vilaĝaninoj en sukeverdaĵoj kaj multkoloraj juvoj. Altkreskaj vilaĝanoj en tabakkoloraj kamizoloj vendis lignajn laktuojn, kuleregojn kaj ŝalmojn. Hebreoj kun longaj barboj, vestitaj en nigraj kiteloj, laŭte rekomendis haringojn, bluetajn sukerkapojn, botojn, vestaĵojn, ilojn, butonojn, laĉojn, potojn... En la homamaso fiksis sin maljunulo – almozulo kun violkolora nazo kaj li kantis raŭke la kortuŝan kanton pri „rozluka“ (disiĝo), ĉiam la saman, kun multaj variaĵoj de la originalo. Sur la bazarplaco miksiĝis diversaj lingvoj, kies vortoj havis por Ludoviko melodion kaj koloron. Li diferencigis lin laŭ tiuj ecoj kaj senerare grupigis.

Tie ĝuste ekkonis Ludoviko pli ol ie ajn, malamikecon dividantan reprezentantojn de la apartaj nacioj. Homoj ĉi tie interkompreniĝadis en speciala maniero. Ĉar ili estis diverslingvaj, ofte ili interparolis, kiel la proverba ansero kun porkido. Kiam ne taŭgis nekonformaj esprimoj ili helpis al si per gestado, ankaŭ per insultado, ofte pli akra. Ne malofte okazis ankaŭ interbatiĝoj kaj epitetoj, kiel „fava judo“, „pola porko“, „rusa buŝaĉo“, „ŝvaba virporko“, „litova bruto“, la epitetoj elkriitaj en diversaj lingvoj ne apartenis al la plej vulgaraĵoj, aŭ la plej malamikaj.

Precipe hebreoj estis ĉi tie humiligitaj, ĉirkaŭis ilin ĝenerala malŝato, kiun neniu el la nacioj avaris al ili. Revenghe ili ankaŭ reciprokis per nefavora rilato al la aliaj nacioj.

Ludoviko sentis tiun ĉi malŝaton tre dolorige.

Kiel estas konate Bjalistoko, kvankam pola urbo, ²⁰ tiam situis en orbito de la rusa imperio. Inter la bjalistoka loĝantaro estis multaj hebreoj devenantaj el rusaj terenoj. Estadanta en ilia ĉirkaŭantaro la patro de Ludoviko, kvankam mem devenis el pola urbeto Tykocin, tre ŝatis la rusan kulturon. Ankaŭ en tiu spirito li edukis la infanojn. ²¹ Videble tion montras la vortoj el la letero de la 21a de februaro en la jaro 1905 skribitaj de Ludovikito al la franca esperantisto Michaux: „Plej multe mi amis tiun lingvon, en

¹⁸ Per tio Ziółkowska donas, simile kiel Privat, ĝeneralan socian difinon de la diversaj etnoj: dum ĉe Privat la poloj estis la „mastroj“, ĉe Ziółkowska ili aperas en formo de la inteligentularo. Germanoj do estis metiistoj, judoj estis komercistoj kaj litovoj/blankrusaj estis kamparanoj. Sendube ankaŭ inter tiuj ekzistis „inteligentuloj“. Mankas la mencio de la tataroj, eble ankaŭ armenoj.

¹⁹ La bazarplaco ne estas dokumentita en la verkaro de LLZ.

²⁰ La historio de Bjalistoko estas pli komplika. Vd. la artikolon pri Bjalistoko en la ĉi-numera Orienteŭropa Encilopedieto.

²¹ Nu, la patro de LLZ estas konsiderata kiel asimilisto.

kiu mi estis edukata, t.e. la lingvon rusan, mi lernadis ĝin kun granda plezuro, mi revis iam fariĝi granda rusa poeto“.²²

Ludovike rapide perdis tiun amon, ĉar en la sama letero ni trovas la jenajn vortojn: „...sed baldaŭ mi konvinkiĝadis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en ni nur senrajtan fremdulon... ĉiuj malamas, malestimas kaj premeblas miajn fratojn...“.²³

Tiu ĉi letero enhavis inter aliaj unu frazon karakterizantan tiamajn bjalistokajn rilatojn kaj la impresemon de la estonta „ideologio“ de frateco de la homaro. „...Ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en nia urbo sin reciproke ĉiuj malamas kaj persekutas“.²⁴ (...)

En la citita jam letero am Michaux Zamenhof komunikas, ke en la dekjara vivaĝo li verkis kvinaktan tragedion. Ĝia temo estis la Babelturo. Ĝi staris ne en la lando Ŝinar, sed sur la vendoplaco de Bjalistoko, kaj ĝiaj konstruantoj estis diverslingvaj bjalistokanoj.²⁵ Naiva aktualigo, ankoraŭ pli naivaj metaforoj kaj simboloj, plenaj de infana sentemo ilustris la ekscitiĝon de la infano. Eble ĝuste tiam en la nedistingebla knabo naskiĝis la penso, kiu poste metis Doktoron Esperanto en la vicon de granduloj de tiu ĉi mondo.

Dudek ses jarojn pli poste²⁶ Zamenhof skribos al Nikolao Afrikanoviĉ Borovko, prezidanto de la unua esperantista grupo en Rusujo: „La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi... en la plej frua infaneco...“²⁷ (...)

Ludovikito tiel rakontas pri tiu tempo:

„Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko²⁸ la loĝantaro konsistis²⁹ el ... rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj. Ĉiu el tiuj ĉi elementoj... malamike rilatis al aliaj elementoj³⁰. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn.³¹ Oni edukadis min kiel idealiston, oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj³² eble ridetas pri tiu ĉi ‚doloro pro la mondo‘ ĉe la infano. Ĉar al mi

²² En ORIG 2 estas „mi lernadis ĝin kun *plej* granda granda plezuro“.

²³ En la originalo estas „konvinkiĝis“

²⁴ Indikita kiel fonto estas: Leteroj de L.L. Zamenhof, v. I, Parizo 1948, p. 111. En la ORIG 2 estas „mia urbo“.

²⁵ Ĉi tiu „kvinakta tragedio“ ne estas konservita kaj la historio kun la Babelturo ne estas dokumentita en la verkaro de LLZ.

²⁶ ?? La letero al Borovko estis skribita verŝajne en 1895 kaj publikigita en 1896, dum la ĉi tie citita letero al Mchaux datiĝas de 1905.

²⁷ Indikita kiel fonto estas: Leteroj de L.L. Zamenhof, v. I, Parizo 1948, p. 343. En ORIG 2 estas „tutan mian vivon“.

²⁸ Ĉi tie estas aldonita piednoto kun la teksto: *Rimarko de la tradukinto*. Zamenhof uzis la rusan nomon de la urbo.

²⁹ En ORIG 2: „konsistas“.

³⁰ En ORIG 2: „neamike rilatas la aliajn elementojn“.

³¹ En ORIG 2: „en malamikajn partojn“.

³² En ORIG 2: „multoj“.

tiam ŝajnis, ke la „grandaĝaj” posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon“.³³

Sub influo de tiuj koleraj entreprenoj de laabela Dio Ludoviko komencis „miksi lingvojn”, ŝanĝi, renversi esprimojn. Li ne estis sola en tio: multaj infanoj faris la samon, kvankam certe pri aliaj instigoj. Li ellernis strangan lingvon kaj en rapida tempo superis majstrojn en ĝia flua uzado. Inter silaboj de vortoj oni enmetis ian negravan silabon, ekzemple „la’ aŭ „de’, aŭ alian, kaj jam la nova lingvo estis preta. „Donu al mi kajeron’ sonis tiam mirinde: „La-do-la-nu la-al la-mi la-ka-la-je-la-ron’, „mi ricevis duon’ – „de-mi de-ri-de-ce-de-vis de-du-de-on’ ktp. ktp. Nia adepto de mirakla arto faris ĉion, por superi konkurantojn pri sperteco en tia babilado. Ludoviko rikoltis ĉi tie verajn triumfojn. Li trovis ankaŭ alian specon de renversiĝo de vortoj. Ekzemple la vorto „pantoflo’ sonis ĉe li „panfloto’ aŭ „topanflo’, „bonan tagon’ – „nanbo gonta’ ktp. El tiuj mirindaĵoj li facile kunmetis frazojn kaj flue ilin uzis rimante.³⁴

Ĉe tiuj infanoj tia manio post iom da tempo forpasis. Ĉe ĉiuj – escepte de Ludoviko Zamenhof. Post jaro de vortrenversado, li komencis krei novan lingvon ! Kaj tiom da energio kaj laboro li enmetis en la vortajn ludojn, ke se li estus uzinta tiujn streĉojn por plenumi postulojn de la lernejo, li ĉiujare saltus tra kelkaj klasoj. Kiam li estis sola, li murmuris per plej stranga slango, notis en dikaj kajeroj signojn kaj formulojn, enuigis kolegojn kaj plenaĝulojn. La fratinoj estis veraj martiroj de lia manio. La plej aĝa, Sara, precipe ĝuanta amon de Ludoviko, akompanis lin en tiu senĉesa babilado, sed la pli junaj, Fania kaj Aŭgusta, nur kun plej granda sindevigo subiĝis al lia komandado, post iom da tempo enuiginte al si la strangan ludon. Felikso, - ankoraŭ suĉinfano, kompreneble ne povis esti kalkulata.³⁵

La patro ne toleris tiun manion de la filo. Tamen ĉe Ludoviko ĝi kreskis ĝis sistema kaj serioza okupado, obstina kaj nobla interesiĝo. Ĝi ne ĉesis eĉ tiam, kiam post transiro en gimnazion pligrandiĝis liaj lernejoj kaj laboro pri hejmaj lecionoj. La patro, opiniante, ke tiu ĉi interesiĝo malhelpas al Ludoviko studadi, energie ĝin kontraŭbatalis. Kiam tamen la knabo ekmalsanis kaj devis dum jaro interrompi vizitadon de la gimnazio, la patro iom cedis al li.³⁶

La inklino de Ludoviko, kiu kun tempo ŝanĝiĝis je aspirado krei lingvon internacian, disflamigis konatulojn de familio Zamenhof. Sinjoro Aŭgusto Orzechowski la homo maljuna kaj honesta, kiel ĝenerale oni parolis pri li kaj lia plena kontraŭo Pinagel³⁷ komercisto kaj posedanto de drapfarejo, vera financa ŝarko de Bjalistoko, „nur je unu naĝilo pli malgranda“ ol la granda industriisto Commichau. Tiuj ambaŭ bjalistokanoj pasie interesiĝis pri ideo de lingvo internacia moda en la XIX jarcento. Ĉiu kompreneble laŭ sia maniero. Pinagel komerciste kaj Orzechowski preskaŭ science. Li multe sciis pri la provoj en tiu fako. Li konis la legendon rakontantan, ke jam en la VII jarcento a.n.e. profeto Cefania antaŭdiris konforme al revoj de tiamaj homoj aperon de

³³ Indikita kiel fonto estas: Leteroj de L.L. Zamenhof, v. I, Parizo 1948, p. 343-344.

³⁴ Ĉio ĉi estas inventaĵo de la aŭtorino, kiu kredeble legis pri lingvoprojektoj kiel Solresol aŭ similaj. Kronologie temis pri la tempo de la lingve uniuersala. Sed tiu epozodo jam apartenas al Varsovio.

³⁵ Ĉi tiu epizodo estas libere imagita de la aŭtorino.

³⁶ Vere estas, ke la patro ne favoris la lingvan projekton de LLZ kaj ke li estis malsana en 1869/70.

³⁷ Aperas jena piednoto: Orzechowski kaj Pinagel estas fikciaj personoj. La Aŭtorino enkondukis ilin, por plivigli la tekston kaj montri interesiĝon pri „universala lingvo“ en la socio. En posta ĉapitro aperas krom la nomo Aleksandro Waldenberg, kiu estas dokumentita nomo (lerneja kamarado de LLZ), la evidente inventita nomo Jentys.

unu lingvo tuthomara, kiu forigos la sekvojn de „la dia malbeno“ ĵetita kontraŭ la konstruantoj de Babelturo. Li aŭdis pri la fama greka kuracisto Galeno el Pergam,³⁸ kiu en la II jarcento a.n.e. provis krei ĉifron por interkompreniĝo de homoj parolantaj diversajn lingvojn. Li legis pri la mezepoka monaĥino Hildegardis el la XII jarcento, kiu prilaboris cetere nun nekonatan „lingvon de l’homaro“.³⁹

La XVI jarcento alportis provon de tia lingvo, nomita „balaibalan“, kreitan de araba ŝeiko Mohyieddin. En la XVII jarcento la granda germana scienculo, Gottfried Leibniz, prilaboris tiel nomatan pasigrafion, en kiu li diris, ke tio estos „arto interkompreniĝi per helpo de la universalaj skribitaj signoj“.

Ne estis fremdaj al Orzechowski nomoj de la dekokjarcentaj lingvistoj, kiuj provis krei unu komunan lingvon, skribmanieron, ĉifron por la homaro: Bergier, Delormel, Maimieux, Sicard kaj aliaj.

– La sistemo de Näther⁴⁰ – diris Orzechowski enpesinĝinte, levinte du fingrojn supren – estas nur embrio, suĉinfano *panlingvae*...

– Kial vi nur pri tiuj universalaj lingvoj? – grumblis Marko Zamenhof. – Ĉiam en tiu stranguliĝinta societo nur pri la samo. Sed, se vi, sinjoro, estas vere tia fakulo, do certe estas konate al vi, ke Näther ne estas la komenco. Li ja publikigis sian specon de stenografio⁴¹ nur en la jaro 1805.

– Mi scias, mi scias ankoraŭ pri kelkcent aliaj provoj. Sed mi ne retiriĝas al la nebula pasinteco nur tial, ĉar la novaj provoj estas multe pli interesaj: Prenu kiel ekzemplon „gablenzografion“⁴² aŭ „solresol“ de Sudre,⁴³ postulanta nur aŭdpovon kaj konon de muziknotoj...

– Bagatelo ! Nur iom da bona aŭdsento, voĉo kaj kono de muziknotoj! Kaj kiel vi imagas al vi enkondukon de tia lingvo ĉe preskaŭ universalaj lingvoj de potenca Francujo, Anglujo, Germanujo aŭ Italujo?

– Sed vi ne bonvolis ankoraŭ aŭskulti min ĝis fino; kion ekzemple faris tia Paic ...⁴⁴

– Ĉi tie en la konversacion enmiksiĝis Pinagel, kiu enfalis en la ĉambron kiel tempesto kaj jam de la sojlo kriis:

– Sinjoroj ! Mi nun faros multe da mono ! Jam ekzistas universala lingvo ! Mi legis ! Imagu al vi iu Paic el Zemlin⁴⁵ eltrovis rimedon interkompreniĝi helpe de ciferoj. Mi ne scias precize kio ĝi estas, sed mi antaŭsentas, ke ĝi estas genia.

– Kaj de kie tiu multa mono ? – demandis moke Marko Zamenhof.⁴⁶

³⁸ Temas pri Claudius Galenus (Klaŭdio Galeno) el Pergamo, Malgrandazio. Vd. Duliĉenko, *Mejdunarodne vspomogatel’nye jazyki* (1990), p. 24.

³⁹ Fakte ŝia lingvosistemo nomiĝis ‚Lingua ignota’ kaj ‚Litterae ignotae’.

⁴⁰ Laŭ Duliĉenko efektive ekzistis iu Ch. G. Berger (1779), C. Delormel (1794-95), J. Maimieux (1797), R.A. Sicard (1808) kaj J.Z. Näther (1805), kiuj postlasis iujn planlingvajn ideojn.

⁴¹ Fakte temas pri pasigrafio.

⁴² Indikita estas jena piednoto: Gablenzografion kaj gablenzolalion kreis en unua duono de la XIX jarcento barono Ludoviko von Gablentz, aŭstria kampmarŝalo. Ili konsistis el alfabeto ebliganta sonesperimon de 33 lingvoj. La eltrovinto prilaboris gramatikon kaj bazajn vortojn. Vortoj elpensitaj de li estis precipe unusilabaj. Laŭ Duliĉenko temas pri Mundografie de M.H. von Gablenz, kiu efektive ofte estis citata kiel Gavlensografie/Gavlensofonie. Ŝajnas, ke ne temas pri 33 lingvoj, sed pri 34 literoj.

⁴³ Indikita estas jena piednoto: Solresol – sistemo de Jean François Sudre, publiki(gi)ta en la jaro 1866. Tio estis sistemo de universala skribo, simila al muziknotoj, metita sur kvinlinion. Apartaj signoj esprimis gramatikajn partojn. (Informoj pri Solresol troveblas en interreto).

⁴⁴ Laŭ Duliĉenko efektive ekzistis iu M. Paic, Serbio, kiu inventis Pazigrafion (1859).

⁴⁵ Mankas ĉ. Temas pri Zemun en Serbio (germane Semlin), nuntempe disktriko de la urbo Beograd.

– Kiel do de kie ? De ĉi tie – Pinagiel ekfrapis sian frunton – se Paic elpensis ciferojn, do mi povas elkombini aliajn signojn, cirkletojn, kvadratojn... kaj ĝuste por tio estos la mono, sinjoro Zamenhof. Pagu la Dana Akademio de Sciencoj.

Sinjoro Marko laŭte ekridis, sed Orzechowski diris kun sia tipa indulgemo:

– Mi konjektas, pri kio la kara sinjoro parolas. Sed ŝajne tio estas jam malnova kaj delonge forpasinta historio. Danoj vere anoncis grandan premion por eltrovo de praktika pasigrafio, sed tio ja estas la jaro 1811, certe ankoraŭ la respektinda sinjoro ne estis veninta en la mondon. Cetere mi ne aŭdis, ke iu ricevis tiun ĉi premion. Volu provi. Mi deziras feliĉon.

Ludoviko estis iom konsternita de tiu interparolo de la plenaĝuloj, prezentanta tiel diversajn vidpunktojn pri la problemoj.

En 1959 aperis ankaŭ la ,Memorlibro pri la Zamenhof-jaro', kiun eldonis CED/UEA sub la redaktado de Ivo Lapenna. En ĝi aperis seriozaj artikoloj pri la biografio de Zamenhof, inter alie de Gaston Waringhien, Edmond Privat, Adam Zamenhof, Vilho Setälä, Andre Albault, Marjorie Boulton kaj Lapenna mem. Waringhien publikigis siajn zamenhofologiajn studojn ankaŭ en aliaj libroj (kiel ,1887 kaj la sekvo' kaj ,Lingvo kaj Vivo'). Kontraste al tio, kio cirkulis kiel dubindaĵoj en la socialismaj landoj pri Zamenhof kaj Esperanto, la festlibro de UEA certe estis bonvena kontribuo al la serioza esperantologio.

Krome, en ,Sennacieca Revuo, 1959, aperis prelego de André Caubel pri ,Nekonato: La Zamenhofa Homaranismo' (elŝutebla en interreto).

Marjorie Boulton: Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto (1962) ⁴⁷

Enkondukaj rimarkoj: Post pli malpli sukcesaj provoj verki biografion far Privat, Drezen kaj Ziółkowska, ĉiuj el scienca vidpunkto ne kontentigaj, venis la vico de Marjorie Boulton (*1924), kiu eklernis Esperanton en 1949 kaj kies famo iĝis ligita kun la verkado de poeziaĵoj, dramoj, noveloj, rakontoj, eseoj kaj tradukoj. Do, la socie engaĝita anglino estas unuavice beletra verkistino, ankaŭ en la angla lingo, kaj ne historiografo. En sia enkonduko al la libro Boulton longe pravigis sian strebadon, konfesante, ke „tiu ĉi biografio estas frukto de laboro farita kun amo“, por aldoni modeste, ke iu kompetenta esperantisto povus verki pli bonan biografion pri Zamenhof, des pli ke estis konataj kelkaj britaj esperantistoj, kies meritoj por tia tasko multe superus la ŝiajn. Sed ĉar en 1958 altprestiĝa brita eldonejo interkonsentis kun ŝi pri serioza anglalingva biografio de Zamenhof kaj ĉar ŝi volis savi la projekton por eldoni la rezulton dum la LLZ-jubileo en 1959, ŝi sentis la „devon ordonantan“, ke ŝi kaptu tian okazon. Laŭ la kontrakto Boulton devis fari ĉiujn esplorojn en la tempo de nur naŭ monatoj. Kvankam tiu kondiĉo ŝajnis al ŝi neebla, des pli ke Boulton estis premita en la profesia vivo kaj malsanis ekde du jaroj, ŝi tamen verkis la anglalingvan version tempe

⁴⁶ Jen la ero, pri kiu Maimon indigniĝis, ke la aŭtorino faris el Marko Zamenhof monavidulon. Tiu frazo ankaŭ aperis en la franca traduko.

⁴⁷ Boulton, Marjorie: Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto. J. Régulo. La Laguna de Tenerife. 1962. 265 p.

preskaŭ akurate, kaj „inter svenoj“. Pro presista striko la libro aperis nur en 1960.⁴⁸ La recenzoj estis ĝenerale favoraj, kvankam oni sentis mankojn.

Ivo Lapenna, la tiama influa ĝenerala sekretario de UEA, instigis ŝin verki la biografion ankaŭ en Esperanto. Ŝi obeis ankaŭ al tiu ‚ordono‘ kaj verkis esperantan version en la konscio, „ke ĝi ne estas tiu verko, kiun mi volis proponi al la diligenta kolegaro aŭ al la senmakula memoro de Zamenhof mem“, kaj kun la espero, ke „ĝi iom utilis en nia Movado, ĉar ĝi almenaŭ enhavas multajn faktojn, kiujn oni alie trovas nur pene, kaŝitajn en malnovaj gazetoj kaj dokumentoj“, kiujn ŝi konsultis. Kaj ŝi esprimis ankaŭ la deziron, ke iu venonto iam verkos pli profundan, erudician kaj belan biografion pri LLZ. Bone, tiom da ekskuzoj akceptitaj. Mankon de sincereco oni ne povis riproĉi al la simpatia angla aŭtorino. Krome, Boulton multe klopodis pri objektiveco en historio, kvankam ankŭ ŝia libro ne estis tute libera de fantazio.

La Esperanta versio ne estis pura traduko de la angla originalo, sed modifita, kontrolita kaj kompletigita teksto, tiel ke la aŭtorino venis al la opinio, ke la Esperanta versio estas „iom pli bona“ ol la angla. La nomojn de tiuj, kiuj helpis al ŝi en tiu defia tasko, inter alie pluraj poloj (kiel Andrzej Rajski), sed ankaŭ Gaston Waringhien kaj Edmond Privat, estas menciitaj en la antaŭparolo. Interesa detalo: Lapenna rifuzis eldoni la biografion en la nomo de UEA, ĉar pro la multegaj eraroj en la esperantlingva manuskripto li konsideris la tekston neeldoninda.⁴⁹ Efektive, la lingvaĵo de la teksto estetike ne estas aparte elstara, kio estas iom miriga en la kazo de aŭtoro, kiu doktoriĝis pri beletro (en Oksfordo) kaj estas praktikanta verkisto.

Tre bedaŭrinde en la libro mankas antaŭparolo fare de elstara esperantisto aŭ de neesperantista personeco. Same forestas fontindikoj, aŭ bibliografio de uzitaj verkoj; ekzistas nur indiko pri la deveno de la publikigitaj fotoj.

Racio kaj amo

(...)

Ĉie en la ‚Pola Reĝlando‘ ekzistis tiranado kaj maljusteco, sed ili plej subpremis⁵⁰ en la ‚litvaj provincoj‘; Bjalistoko troviĝis en la provinco de Grodno,⁵¹ en regiono, kie loĝis precipe poloj, blankrutenoj kaj judoj. Kompreneble la regnaj kadroj estis rusaj; germanoj havis gravan lokon en la kreskanta industria vivo; kaj litovoj loĝis kampare en la norda parto de la regiono.⁵²

La carista reĝimo multrilate subpremis eĉ rusojn, sed pli subpremis polojn. La pola ribelo de 1863 okazis, kiam Ludoviko estis infano. La firenoma ‚Murajev la Pendigisto‘⁵³ sufokis polan naciecon kaj trudis malklerigan formalismon en la lernejojn.

⁴⁸ Informo en artikolo de M. Boulton en ‚Eseoj memore al Ivo Lapenna‘, 2002, p. 222.

⁴⁹ Samloke.

⁵⁰ Stranga apliko de la verbo subpremi. Laŭ NPIV du aplikoj eblas: subpremi estas ĝenerale transitiva, sed eblas ankaŭ ‚subpremi sub sia povo, potenco‘. Tamen, kelkajn liniojn poste Boulton uzas tiun verbon kun sia transitiva apliko.

⁵¹ Ĉe Boulton Grodno estas unuafoje menciita en LLZ-biografio, reference al la letero de LLZ al Borovko, de 1896.

⁵² Ĉi tie aperas piednoto, laŭ kiu G. Waringhien konsilas, ke ni uzu *Litvo* (kiun uzis Grabowski) por tiu regiono. Kiam Zamenhof parolis pri „mia kara Litovujo“ li ja ne parolis pri tiu regiono, kiun ni nuntempe nomas ‚Litovujo‘, sed pri tiu iama granddukejo [ne granddukejo kiel ĉe Boulton], la ‚litvaj provincoj‘.

⁵³ Temas pri Miĥail Nikolaeviĉ Muravjov (ne Murajev), ĝenerala guberniestro en Vilno, kiu organizis brutalan eksterman agadon kontraŭ la poloj kaj pro tio ricevis la moknomon ‚la pendigisto‘. Sub lia

Oni fermis la Polan Universitaton en Varsovio kaj anstataŭigis ĝin per rusa universitato. Ĉie en la ‚Pola Reĝlando‘ oni iom malhelpis polan kulturon: ekzemple, ĉiuj prelegoj en la Universitato de Varsovo, eĉ pri la pola literaturo, devis esti en la rusa lingvo; ĉie instruado en lernejoj estis ruslingva kaj tial kvinono de la pola popolo senrimede restis analfabeta; la belegaj polaj naciaj kostumoj, la nacia flago, polaj kantoj kaj naciaj emblemaj, estis malpermesitaj – eĉ en teatroj. Multaj gravaj polaj libroj estis haveblaj nur kontrabande. La pola lingvo estis permesita nur en teatraj prezentadoj. Sed en la litvaj provincoj la pola lingvo ne havis eĉ tiun rajton. En Vilno eĉ la uzo de la pola lingvo surstrate estis malpermesita; sed en Bjalistoko la reĝimo estis pli milda.

Kiel ĉie sub carista tiranado, intelekta vivo estis sufokata per kapricema, malklera kaj malkleriga cenzuro. Kiam la fama dana erudiciulo George Brandes vizitis Polujon inter 1880 kaj 1890, li trovis, ke la doganisto ĉe la pola landlimo devis sendi iun ajn ne al li konatan libron al la cenzuristo al Varsovio; ke, kiam li faris publikan prelegon, oni ne nur cenzuris la tekston antaŭ la prelego, sed sendis al la halo mem cenzuriston, kiu sidis kun notlibro kaj kontrolis, ke la preleganto ne modifis la aprobitan tekston; ke ĉiu ĵurnalo aŭ gazeto sendita al Ruslando estis forprenita el la kovrilo kaj atenteme kontrolita. Aŭtoroj kaŝadis siajn pensojn per alegorioj, perifrazoj, kaŝaludoj; kaj tiujn ĉi la cenzuristoj serĉis tiel groteske rigore, ke iam la vortoj „kaj kuiru super libera fajro“ estis forstrekita el kuireja receptlibro, ĉar oni neniam rajtis uzi la vorton „libera“.

Sed pli malfeliĉaj ol la poloj estis la hebreoj. Dum la mezepoko, multaj persekutitaj judoj rifuĝis en Pollandon, kie oni tiutempe permesis al ili labori kiel komercistoj aŭ manlaboristoj. Ili kunportis hebreajn tradiciojn, la judan lingvon,⁵⁴ siajn apartajn kostumojn kaj morojn.⁵⁵ Bjalistoko troviĝis en la tielnomita ‚juda Loĝolando‘,⁵⁶ difinita la unuan fojon en 1791; nur tie rusaj judoj rajtis, ordinare, ekloĝi. La polaj judoj, ekzemple en Varsovio, estis iom pli liberaj.

Ankaŭ germanparola grupo loĝis en la Grodno-provinco; tial Lazaro povis aŭdi, sur la stratoj de Bjalistoko: la rusan – la oficialan lingvon kaj sian hejman lingvon – la polan, germanan kaj la jidan; en la sinagogo kun Rozalia li ankaŭ aŭdis la hebrean.

La sorto de la hebreoj variadis laŭ la sinteno de la registaro, sed ili estis konstante, pli-malpli, viktimoj kaj pekkaproj. La plej bona rimedo por atingi relativan sekurecon kaj prosperon estis fariĝi kuracisto. Post 1861, judo, kiu estis doktoro pri medicino, aŭ posedis unu el la diversaj difinitaj universitataj diplomoj de doktoro, magistrato⁵⁷ aŭ kandidato, rajtis ekloĝi ie ajn en la Rusa Imperio, kun sia familio kaj eĉ kelkaj dungitoj. Diplomitoj de la mezlernejoj rajtis forlasi la ‚Loĝlandon‘ por daŭrigi la studojn. Tiaj cirkonstancoj grandparte pravigis la preskaŭ kruelan insistadon de Marko pri premegea studado eĉ ĉe infanetoj.

regado la Pola Reĝlando estis degradita al la ‚Ĉevistula lando‘ kaj li akcelis la rusigon de la tuta publika vivo en la litovaj kaj polaj regionoj.

⁵⁴ Tiel nomata jida (yiddish).

⁵⁵ Elformiĝis du ĉefaj branĉoj de la orientaj aŝkenazoj: la pola kaj la litova branĉo. LLZ apartenis al la litova.

⁵⁶ Temas pri la speciala loĝzono (ruse: Чёрта оседлости, pole: Strefa osiedlenia), kiu en 1791 estis enkondukita sub carino Katarino II. por judoj. Ĉi tiu loĝzono por la ĉ. kvin milionoj da judoj, kiuj ne rajtis forlasi ĝin, kovris vastan teritorion inter litovaj, polaj, blankrutenaj kaj ukrainaj regionoj. La zono ekzistis ĝis 1917.

⁵⁷ Devus esti: magistro.

Per la laciĝemaj, fiksiĝemaj miopaj okuloj, per la freŝaj, impreseblaj okuloj de knabeto, Lazaro Zamenhof vidis infanojn ĉasi unu la alian, bati unu la alian, ĵeti ŝtonojn unu kontraŭ la aliajn, ĉar kelkaj estis judaj, kelkaj nejudaj. Li vidis, kiel rusaj soldatoj malpermesas al poloj paroli pole, minacante ilin, sakrante, kelkfoje arestante aŭ batante tiujn, kiuj malplaĉis al ili. Sur la strato oni ofte kriis post la knabeto: „Ajlo!“, ofendan aludon al la juda kuirado. Li vidis homojn, kiuj kraĉis, kiam judo preterpasis; kiuj forpuŝis aĝajn judajn kadukulojn sur la trotuaro.

Li aŭdis flustrojn pri la abomena ‚Sanga Akuzo‘ – tiu tute kalumnia akuzo, ke judoj murdas kristanajn infanojn por specialaj ritoj, kiu inter 1859 kaj 1900 kaŭzis dudeknaŭ kontraŭjudajn amasfuriozojn.⁵⁸ Iun tagon, en Bjalistoko mem iu kristana infano malaperis, kaj la tie loĝantaj judoj travivis tempon de angora timo ĝis la retrovo.

La patrino de Lazaro instruis al li, ke ĉiuj homoj estas gefiloj de amata Dio; malsimilegis la leciono de la stratoj. Kaj Lazaro longe meditadis pro⁵⁹ tiu enigmo.

En la konata letero, probable skribita en 1895,⁶⁰ al la rusa esperantisto N. Borovko, la matura homo skribis tiel pri siaj travivaĵoj:

„Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiuj⁶¹ el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa, kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj. Kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj⁶² eble ridetos pri tiu ĉi ‚doloro pro la mondo‘ ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la ‚grandaĝaj‘ posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.“

Familiano rakontas, ke iam Lazaro Zamenhof vidis kverelon sur la strato: kamparano terure kriaĉis kaj sakris blankruse, dum komercisto simile kriaĉis kaj sakris jide; ili videble estis pretaj bati unu la alian; kelkaj polaj kaj rusaj knaboj alkuris.. Subite, el alta fenestro, aŭdiĝis kanto, per tre bela vira voĉo. La kantado baldaŭ sorĉis ĉiujn al silento; jes, muziko estas speco de universala lingvo.⁶³

Kompreneble, la ideo, ke, se ĉiuj homoj parolus unu lingvon, malamo intergenta ĉesus, estis naiva; sed nur neordinare talenta infano povus sendepende rezoni tiel bone. La lingvaj malsimilecoj, kaj la malsimilecoj pri religio kaj la konformaj moroj estis simple la plej videblaj al knabeto en Bjalistoko. Lazaro tiam sciis nenion pri la pli grandaj historiaj problemoj; pri alispecaj imperioj kaj kolonioj; pri ekonomiaj rivalecoj kaj konfliktoj; pri klaskonfliktoj; pri la realaj komplikaĵoj de ĉiuj mondskalaj organizoj; aŭ pri tiuj tre nigraj, sulfurfumaj nekonsciaj timoj kaj envioj, kiuj kaŝiĝas sub rasa malamo.

⁵⁸ La faka vorto estas: pogromo.

⁵⁹ Prefere: pri (laŭ NPIV).

⁶⁰ La letero estis publikigita en *Lingvo Internacia*, 6-7/1896.

⁶¹ En ORIG 2: ĉiu.

⁶² En ORIG 2: multoj.

⁶³ Ĝis nun mi ne povis trovi inter la rememoraĵoj de LLZ-familianoj dokumentitan fonton pri tia aŭ simila anekdoto.

Lia milda, amema temperamento sciis, tiutempe, relative malmulte pri la misteraj detruemaj, eĉ sindetruemaj, inklinoj, kiuj troviĝas en multaj homaj psikoj; tiu ĝoja malaltigo de si mem al la plej malalta moralo, dum vera amasfuriozo; tiu terura kapablo konvinki nin, ke malamo povas esti virto, gratuli sin, pro siaj plej malhumanaj pensoj; kaj tiu volupto de krueleco, kiu anstataŭas la pli gajajn kaj vivestimajn voluptojn, kiu estas multe pli danĝera, ĉar oni povas ĝui ĝin sen satiĝo kaj ofte kun la aprobo de multaj aliaj. Eĉ la plenaĝa Zamenhof ofte miris pri la malbonfaremo de kelkaj homoj. Tamen, kvankam universala lingvo ne estas, kiel kredis la infano, universala kuracilo kontraŭ malamo, ĝi ja estas tre valora kuracilo inter diversaj aliaj.

Tiu ideo pri universala lingvo komencis preskaŭ obsedi Lazaron. Lia lingvoscio estis tre bona: tiutempe, iu ajn klera ruso scipovis tri-kvar lingvojn. La rusa estis lia hejma lingvo; li aŭdis la hebrean en la sinagogo kaj probable ricevis ankaŭ privatajn lecionojn pri ĝi; Marko instruis al li la francan kaj germanan, kiujn li ankaŭ studis en la lernejo; la jidan li aŭdis surstrate, ankaŭ la polan, kiun li pli malfrue parolis perfekte.

En aŭgusto 1869, iom antaŭ la deka naskiĝdatreveno, laŭleĝa aĝo por tiu promocio, Lazaro eniris la realernejon en Bjalistoko. Tie oni studis la grekan aŭ preparis sin por universitato, sed judo povis pli facile lernejniĝi. Lazaro konsciencie studis, inter ses aliaj familianoj dense loĝantaj en tri ĉambroj, kaj kiam Felikso estis ankoraŭ plorema bebo. Post kelkaj tiaj semajnoj li iĝis tiel malsana, ke li devis resti hejme ĝis januaro 1870. Dum tiu periodo li multe legis, provis ruslingvan versfaradon kaj verkis ‚kvinaktan tragedion‘.⁶⁴ Dume, Marko devis konstati, ke la spaco ne sufiĉas por malsana patrino kaj kvin geknaboj; baldaŭ la familio transloĝiĝis al Varsovio, kie li⁶⁵ serĉis pli enspezigan laboron.

(...).

Utila por la kompreno de la zamenhofa homaranismo estis la broŝureto de iu C. Van Kleef 'La Homaranismo de D-ro L.L. Zamenhof' (1965).

En 1969 aperis en Helsinko de Adolf Holzhaus: ‚Doktoro kaj Lingvo Esperanto‘. En ĉi tiu libro la aŭtoro esploris la devenon de la familio Zamenhof, la lingvokononon de L.L. Zamenhof, publikigis la Espranto-tradukon de diversaj gravaj artikoloj verkitaj de L.L. Zamenhof lige kun la cionismo. La sama aŭtoro aperigis en 1972 la tradukon de Hilelismo de Zamenhof. [projekto pri solvo de la hebrea demando] kaj en 1975 Leterojn de LLZ.

En 1978 Japana Esperanto-Instituto publikigis la studojn de N.Z. Maimon en la libro ‚La kaŝita vivo de Zamenhof‘. En ĉi tiuj studoj esperantisto unuafoje enprofundiĝis en la judan kuntekston rilate al la kreinto de Esperanto kaj en senhagiografia maniero klarigis facetojn de la ekzistado de Zamenhof, pri kiuj la esperantistoj ĝis nun estis apenaŭ aŭ tute ne konsciaj.

⁶⁴ Oni ne scias precize kiam li verkis tiun aferon.

⁶⁵ ‚Li‘ rilate al ‚familio‘ estas iom stranga uzo, sed evidente temas pri Marko Zamenhof. Tipa senzorgaĵo pro tro hasta tradukado kaj verkado!

Ryszard Kraško:
Ludoviko Zamenhof – la kreinto de Esperanto (1973/1983) ⁶⁶

Enkondukaj rimarkoj: La sekva teksto estas ĉerpita el studo de Ryszard Kraško (1931-1980), pola ĵurnalisto kaj verkisto de rakontoj kaj historiaj prilaboradoj, kiu en 1972 aperis en iu pollingva scienca libro pri la historio de Bjalistoko.⁶⁷ La Esperanto-traduko (de Andrzej Zieliński) aperis en 1982, do 11 jarojn poste, en iu libreto kun tri sciencaj artikoloj krom de Kraško ankaŭ de du aliaj junaj polaj Eo-intelektuloj kaj PSEK-anoj: Jerzy Leyk pri sociologia karakterizo de la Esperanto-movado kaj Walter Ŝelazny pri la doktrino de Zamenhof. Dum Leyk kaj Ŝelazny fariĝis elstaraj esperantistoj,⁶⁸ Kraško iom famiĝis en nordorienta Pollando, dum por la cetero de la lando li apenaŭ estis fama. En Esperantujo Kraško estis absolute nekonata, kvankam li iom scipovis la Internacian Lingvon. En la antaŭparolo al la libreto, en kiu lia studo pri Zamenhof en Esperanto aperis, estas plue notite: „Laŭ lia eseo pri Zamenhof ni rimarkas, ke li apogis sin je tre modestaj fontoj pri la kreinto de Esperanto kaj multe ĉerpis el preskaŭ porinfana libro de Maria Ziółkowska, ‚Doktoro Esperanto‘. Ĉion alian li serĉis en nekonataj por ni fontoj multfoje ne indikante ilin. Tamen lia scio de la temo sendube metas Kraško-n en la vicon de la plej spertaj zamenhofologoj. (...) Okulfrape oni rimarkas, ke la motivo verki tre profundan eseon pri Zamenhof estis lia omaĝo ne al la unua esperantisto en la mondo, sed al la unua monda civitano de la urbo Bjalistoko. La fiero pri Zamenhof ĉe Kraško apartenas al la kategorio de la sama fiero, kiun posedas la loĝantoj de Torun al Kopernik, de Ĝenevo al Rousseau, de Poitiers al Descartes aŭ fine de La Chaux-de-Fonds al Le Corbusier, kie duagrade gravas, ĉu ili respektive famiĝis pro astronomio, filozofio, matematiko aŭ arkitekturo. (...) Kraško ne perdas glorante Zamenhof realismon kaj kritikemon. (...) Tre kritikajn rimarkojn esprimas Kraško rilate al socia penso de Zamenhof. Kraško ne timas nomi kelkajn sociajn pensojn de li utopio kaj eĉ naivaĵo.” Tiel oni eble iom alproksimiĝis al la marksisma linio sinteno de Ernest Drezen en la 30aj jaroj. Necesus legi la tutan studon de Kraško por ne perdi la koherecon de lia kontribuo.

(...)

Ludoviko Zamenhof estis edukata ruskulture. Jam plenaĝe (en 1905) li skribis al la franca esperantisto Alfred Michaux: „Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t.e. la lingvon rusan, mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro, mi revis iam fariĝi granda rusa poeto.”⁶⁹

⁶⁶ Esperanto-traduko de Andrzej Zieliński en: *Ryszard Kraško, Zamenhof: Jerzy Leyk, Movado; Walter Ŝelazny, Doktrino*. Varsovio 1983, Esplorkleriga Centro de Pola Esperanto-Asocio. 124 p.

⁶⁷ En *Studia i materiały do dziejów miasta Białegostoku*, Białystok 1972.

⁶⁸ Leyk kabeis pro seniluziigo pri la Esperanto-movado post la t.n. puĉo en Pola Esperanto-Asocio en 1985, kaj Ŝelazny konsideras sin sendependa socisciencisto kun simpatio al ideoj de la Esperanta Civito, opozicie al UEA.

⁶⁹ Citite el *Leteroj de L.L. Zamenhof*, 1948.

Tiuspecifaj vidpunktoj karakterizis ne nur la familion de Zamenhof. Plimulto da bjalistoka juddevena intelektularo estis parte aŭ entute rusigita. La medio en kiu Ludoviko Zamenhof edukiĝis, malvolonte uzis memori, ke Marko Zamenhof estis instruisto pri fremdaj lingvoj en la loka reala lernejo, kie li estis instruanta i.a. la rusan lingvon.

Bjalistoko, kie Ludoviko Zamenhof naskiĝis kaj edukiĝis, estis multnacia urbo. Ni ne havas precizan statistikon pri la periodo, kiam loĝis tie la kreonto de Esperanto. En la dua duono de la sepdekaj jaroj inter 30 mil loĝantoj estis: iom pli multe ol 3 mil poloj, ĉirkaŭ 4 mil rusoj, 5 mil germanoj kaj 18 mil judoj.⁷⁰

En la plej proksima najbaraĵo de Bjalistoko loĝis multaj blankrusoj, kiuj vizitadis la urbon almenaŭ unu fojon semajne por partopreni tradician foiron okazantan ĉiuĵaŭde sur la foirejo komencanta la straton Zielona (nun Zamenhof),⁷¹ En la jaroj 1859-1873, kiam en Bjalistoko loĝis Marko Zamenhof kun sia familio, la urbo ankoraŭ ne estis industria. En 1860 ĉirkaŭ 14-mila Bjalistoko havis 10 teksestablojn laborigantajn sume 453 homojn, el kiuj 130 laboris en la plej granda stablo apartenanta al M. Błochowa kaj preskaŭ 190 en la sekvantaj laŭgrande fabrikoj de H. Connichau kaj de Gelpner. La ceteraj stabloj estis duonmetiejoj nombrantaj de 4 ĝis 45 laboristojn.⁷² La resto de la bjalistoka loĝantaro vivtenis sin dank' al komerco kaj metio. Malgraŭ negranda nombro da loĝantoj kaj eta industriigo la urbo estas moviĝema, ĉar ĝi okupis la terenon palisetitan fine de la 18-a jarcento kiel ankoraŭ privata urbeto nombranta apenaŭ iom pli multe ol 3700 homojn.

La multlingva medio tutcerte influis la vekiĝon de lingvistikaj interesiĝoj ĉe Zamenhof. La 14-aĝa Ludoviko Zamenhof majstris ses lingvojn; bonege la polan, rusan kaj germanan. Probable jam en la infanaĝo komencis penetri lin la ideo krei universalan lingvon, per kiu diversnacionoj povus interkompreniĝi. Pri tio informas nin lia posta korespondado. Li tiel skribis al la rusa esperantisto Nikolao Borovko: „La ideo al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi... en la plej frua infaneco...”. Kaj iom poste pli eksplicite: „Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjalostoko⁷³ la loĝantaro konsistis el... rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj. Ĉiu el tiuj ĉi elementoj... malamike rilatis al aliaj elementoj.

En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de la lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukadis min kiel idealiston, oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj kaj dum sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paso igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon... Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la „grandaĝaj” posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.”⁷⁴

⁷⁰ Ĉi tiujn indikojn Kraŝko transprenis de Ziółkowska.

⁷¹ Vd. la ĉi-koncernan rimarkon en la ĉapitro pri Ziółkowska.

⁷² Laŭ piednoto temas pri informoj el iu pola libro de A. Werwick pri la bjalistoka ekonomio ĝis 1945. (Varsovio 1957).

⁷³ La aldonita piednoto tekstas: Kiel skribas I. Dratwer, Zamenhof uzis la rusan nomon de la urbo. /rim. de la tradukinto/.

⁷⁴ La aŭtoro evidente kopiis tiujn citaĵojn ĉe Ziółkowska.

En la pli frue citita letero al Alfred Michaux ni trovas ankoraŭ unu mencion firmigantan nian konvinkon, ke la specifa bjalistoka medio en la dua duono de la 19a jarcento ege influis interesigemon de la kreinto de Esperanto. En tiu letero - iom palpebrume, iom kun la sentimento de la plenkreska homo taksanta siajn junaĝajn eksperimentojn – Ludoviko Zamenhof memorigas sian kvinaktan tragedion verkitan en Bjalistoko en 1869. Li estis tiutempe 10-jaraĝa, kio ne povas lasi iluziojn koncerne la literaturan valoron de la verko. Ne tio tamen estis esenca, sed la temo. La juna aŭtoro ekĉerpis ĝin el la Biblio, precipe asidue studata en ortodoksaj judaj familioj. Ekfascinis lin nome la biblia turo Babel. En sia tragedio, dediĉita ĝuste al ĉi tiu temo, la aŭtoro lokis la turon Babel sur la bjalistokan urboplacon. En la verko malbenitaj de Dio konstruantoj de la turo estis diverslingvaj bjalistokanoj.⁷⁵

En la infanaĝo Ludoviko Zamenhof skribadis ankaŭ poeziaĵojn. Certe ankaŭ kiel plenkreskulo li demonstris versemon, kion pruvas tiaj verkoj kiel ekzemple ‘Preĝo sub la verda standardo’ aŭ ‘La Espero’. Tiu lasta jam dum la 1-a Kongreso en Boulogne ekrangis kiel himno. Eĉ malprofunda analizo montras, ke ili ambaŭ ne estas grandvaloraj tekstoj el la literatura vidpunkto. La frujunaĝaj verkoj ne postrestis, ni povas tamen konjekti, ke ilia literatura valoro estis des pli malgranda. Ni mencias ilin nur por substreki la tezon, ke la kreinto de la universala lingvo estis infanaĝe ege sentema ulo. Supozeble li pli dolore ol la samaĝuloj toleris la malestimon ĉirkaŭantan la judojn en cara Ruslando, ilian socian diskriminadon esprimiĝantan i.a. per difinado de regionoj kun loĝpermeso, limigado de kvanto da judaj infanoj en gimnazioj, anticipa precizigo kiujn ŝtatpostenojn la judo ne povas preni ktp. Tiun diskriminacion kiel infano li tutcerte dolorsentis dum personaj kontaktoj kun samaĝuloj. En letero al Michaux pri sia amo de la rusaj lingvoj kaj kulturo li esprimis ankaŭ malajn sentojn: „...sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj majstroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur senrajtan fremdulon..., ĉiuj malamas, malestimas kaj premegegas miajn fratojn”.⁷⁶ Kial ne supozu, ke ĝuste tiuspecaj sentoj influis la naskiĝon de la ideo: „Kiam mi estos grandaĝa mi trovos komunan lingvon kaj instigos ĉiujn popolojn por uzi ĝin por ilia bono”.⁷⁷

Konklude ni povas formuli la tezon, ke la bjalistoka medio ege influis konceptojn de Ludoviko Zamenhof. La ideo pri egaleco de ĉiuj homoj – la rezulto de la religia kredo – starigita kontraŭ la realo iniciatis la penson, ke la tuta malbono devenas de tio, ke la homoj superŝutitaj de Dio per natura boneco, ne povas interkompreniĝi, ĉar ili uzas diversajn lingvojn. Evidenta neĝusto de tia premiso ne estas pruvenda. Oni devas tamen klare diri, ke Zamenhof – eĉ kiel plenaĝulo – ne komprenis sociajn mekanismojn en cara Ruslando, do ankaŭ sur la pola teritorio aneksita en la rusan imperion dum la dispartigo de Pollando. Li ankaŭ misaprezis la nepron batali kontraŭ malbono per alia metodo ol tenera persvado. Li estis deklarita malamiko de revolucio, kio estas videbla en la leteroj skribataj al amikoj dum la revolucio 1905-1907 kaj en la paroladoj el tiu periodo. Pravas Maria Ziółkowska dirante: „Tiu heroldo de l’amo tamen ne komprenis la neeviteblan bezonon de batalo kontraŭ malamo. Li ne komprenis la revolucion, kvankam li mem proklamis la plej profundan ŝanĝon en la mondaj rilatoj.”⁷⁸

⁷⁵ Bedaŭrinde ankaŭ Kraŝko blinde transprenis tiun dubindan anekdoton de antaŭaj aŭtoroj.

⁷⁶ Citite el Leteroj de L.L. Zamenhof, 1948.

⁷⁷ Citite el Leteroj de L.L. Zamenhof, 1948.

⁷⁸ Laŭ M. Ziółkowska. Doktor Esperanto. p. 210.

(...)

En 1974 aperis ĉe UEA la kolosa monografio ‚Esperanto en Perspektivo‘, kiun verkis Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro. La libro estis la pliampleksigita versio de la antaŭa konciza manlibro ‚La internacia lingvo‘ kiel frukto de propono kolekti ĉiujn faktojn pri Universala Esperanto-Asocio, kiam en 1954 ĝi estis proponita por ricevi la Nobel-premion pri paco. Sur paĝoj 124-5 aperis ankaŭ mallonga ĉapitro pri la ‚socia kaj hejma medio de L.L. Zamenhof‘, kiu havis jenan tekston:

„L.L. Zamenhof vivis en lando, kie la kapitalismo ekzistis nur embrie.⁷⁹ La tiama Rusa Imperio estis ŝtato, kie en 1859 ankoraŭ ekzistis feŭdaj rilatoj, kaj en kiu, ĝis 1917, la burĝa klaso estis politike senrajta antaŭ la aŭtokrate reganta feŭda klaso (grandaj kamparaj posedantoj, generaloj, burokratoj, eklezio, kortego kaj korteganoj: ĝenerale ĉiuj apartenantaj al la nobelaro).

La familio de L.L. Zamenhof apartenis al tiu internaciisma juda kultura fono, en kiu, poste, la plej modernaj okcidentaj revoluciaj ideoj akceptiĝos. Tiamaniere la unua, tipe rusa, kontraŭfeŭda kaj kontraŭkapitalisma, esence etburĝa kaj personisma revolucia movado, la populismo, kun kamparanutopia komunisma idealo kaj labormetodoj ekstreme individuismaj, iom post iom, cedis teorie kaj praktike antaŭ la marksismo.

Tio ne signifas, ke tiu popolgrupo konscie laboris kontraŭ la caro. Tamen, la tiutempaj Judoj troviĝis meze de gravaj kontraŭdiroj: lingve kaj socie diskriminaciaj, ili serĉis rifuĝejon en la praavan religion, kiu garantiis al ili la dian protekton. Multajn la t.n. juda iluminismo⁸⁰ invitis emancipiĝi, tamen gardante la tradiciajn kutimojn kaj religion.

Sed la neebleco emancipiĝi, ne forlasante la judan religion. en la cara Rusio, gvidis multajn ree al la tradicia religio, kiun ili interpretis eskatologie; kaj multajn tio kondukis al pozitivisma ateista pozicio. Rezulte, tiuj, kiuj ne volis perdi la tradiciajn judajn valorojn (kaj eventuala la malnovajn religiajn tradiciojn), komencis trovi solvon en la cionisma movado (unue utopie sentata). Pli poste la strebo por emancipiĝo, kaj la deziro konservi la validajn hom-liberigajn tradiciojn de judismo, trovis sian analizan fundamenton, kiu permesis teoriigi la klasajn rolojn de la judismo, en la kadro de la sociklasaj kontraŭdiroj en Rusio, kaj ellabori emancipiĝan teorion kaj taktikon por la socia revolucio.

Marko Zamenhof, la patro de L.L. Zamenhof, klerisma pozitivistino, ateisto,⁸¹ laboris cetere en la cenzura aparato por la caro: tion li faris unuflanke, ĉar en tiu epoko la klasika evoluo de la judisma movado ne jam superis la fazon de la burĝa pozitivismo, kaj, aliflanke, pro la neceso nutri sian familion, do certe ne pri ia mistika amo por la caro aŭ pri intima konvinko. La urbo, en kiu Zamenhof naskiĝis, Bjalistoko (pole Białystok, ruse Bjelostok), estis gente miksitita. Laŭ M. Boulton, en 1897 66% de la loĝantaro estis jidparolanta (judreligia), 18% estis Poloj (katolikoj), 8% Rusoj (ortodoksuloj), 6% Germanoj (luteranoj) kaj 2% Bjelorusoj. Inter 1850 kaj 1900 okazis

⁷⁹ Tamen, en la dua duono de la 19a jc. en Bjalistoko evoluis forta kapitalisma industrio, vd. ekzemple N.Z. Maimon, ‚La kaŝita vivo de Zamenhof‘, p. 19.

⁸⁰ Temas pri la juda kleriga movado de la haskalao.

⁸¹ Fakte laŭ la notaĵoj, kiujn LLZ postlasis sur sia skribotablo, estis malkovrite, ke li pritaksis sian patron ateisto (kaj la patrinon profunde pia).

19 sangaj pogromoj kongraŭ la Judoj, kaj la socia kaj ekonomiaj diskriminacioj estis grandaj. Tiuj faktoj komprenigas, kial la tiama situacio en Bjalistoko tiel forte influis Zamenhof sur lingva kaj religi-etika kampoj.

L.L. Zamenhof kreskis en duone klerisma, duone religia (ne bigota) etburĝa medio; la patro influis lin per sia obstino kaj metodeco labori, la patrino heredigis al li sian mildan temperamenton kaj kompaton por la suferantoj. Tiuj du esencaj trajtoj de L.L. Zamenhof, kiuj tiel harmonie kuniĝis kun eksternorma inteligenteco, klarigas, el individuisma vidpunkto, la kaŭzin de la fascino, kiun li elradiis, kaj kiu estis tiel grava dum la unuaj jaroj de Esperanto.“

Post kiam mi kun ioma miro demandis min mem kaj poste ankaŭ Tazio Carlevaro-n, ĉu vere li verkis tiun iom bizaran tekston, kiu sonas eĉ pli marksismece ol tiu de Drezen, Carlevaro jese konfirmis tion, klarigante ke siatempe marksisme influitaj ideoj kaj interpretoj estis vaste popularaj, ankaŭ ĉe li mem.

Cetere, en la sama tempo (1976) estis publikigita (en Kioto) la Eo-traduko de studo de E. Spiridoviĉ, 'Genia lingvisto venkita de etburĝeco'. Pri fundamentaj momentoj en la lingva teorio de Zamenhof.

Kaj en 1977 aperis (en Tokio) de Halina Edelbaum 'Halina dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof', kiu publikigis oficialajn lerneajn dokumentojn de LLZ.

ludovikito (Ito Kanzi): senlegenda biografio de l.l. zamenhof (1982) ⁸²

Enkondukaj rimarkoj: La jubilea jaro 1959 havis tutmondan efikon – ĝis Japanio. Ĉi tie la movado ekzistis de 1919, kaj Japana Esperanto-Asocio aliĝis en 1956 al UEA kiel ties Landa Asocio. Okaze de la 100a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof fariĝis esperantisto ankaŭ Ito Kanzi [itō kanji, 1918-2005], kiun la Esperanto-movado ekkonos kaj tre alte estimos kiel 'ludovikito'.⁸³ Fakte tiu memorjaro aŭguris lian kolosan vivoverkon, al kiu li komplete dediĉis sin dum pli ol tri jardekoj. La fruktoj estos rikoltitaj en formo de la Plena Verkaro de Zamenhof (PVZ) kun pli ol 50 volumoj. Unu el tiuj volumoj estis konceptita kiel biografio pri Zamenhof, el kiu ni prezentas la ĉapitron pri Bjalistoko. La provo nomiĝas 'senlegenda biografio', ĉar ludovikito eble komprenis, ke la ĝis nun aperintaj biografioj konsistis parte el legendecaj kaj hagiografiaj elementoj, kiujn li celis forigi per nura koncentriĝo pri la faktoj. Lia teksto do konsistas pli el faktoj kaj ciferoj, kun forta atento al eldonadoj kaj lingvistikaj detaloj. Kanzi, kiu cetere verkis (ŝajne ne eldonitan) biografion pri Zamenhof en la japana lingvo, konfesis en korespondaĵo kun Waringhien, ke li malbone regas Esperanton, ĉar li apenaŭ praktikas ĝin parole kaj do senkulpiĝis pro la malbona skribstilo, kiu estas sentebla en liaj originalaj verkaĵoj. En la prilaboraĵo de ludovikito tuj rimarkeble reaperas la temoj, kiujn ni konas el la antaŭaj biografioj, sed la japano digestis ilin laŭ sia propra

⁸² ludovikito. senlegenda biografio de L.L. Zamenhof. PVZ, kromkajero 1. Tokyo 1982. 303 p.

⁸³ Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Ito_Kanzi kaj <http://www.liberafolio.org/2005/persono/ludovikitointervjuo>

maniero. Karakteriza por la eldonoj de ludovikito estas la minuskla uzado en la ortografio, kio alportis al li kritikon flanke de eŭropaj eldonistoj kaj legantoj.

antaŭklarigo tro normala

(...) sed, kiom mi scias, en ĉi mondo troviĝis unu homo, kiu konservadis tian naivan revon kaj laboradis por tiu celo dum sia tuta vivo. lia nomo estis lazaro ludoviko zamenhof, kiu naskiĝis en rusujo je la mezo de la 19a jarcento de judaj gepatroj, kaj mortis kiel homarano je la komenco de la 20a jarcento, dum la unua mondmilito.

(...)

ili ankaŭ estis fieraj pri la diverseco de sia civilizo. ĉiu nacio, ĉiu gento klopodis ekflorigi sian propran kulturon, kaj ĉiu memstare penis poluri sian lingvon nacian aŭ gentan, kaj konkure klopodis grandigi sian literaturon. precipe la plej progresintaj ŝtatoj, fieraj pro siaj fortaj armiloj, reciproke konkuris por alproprigi al si la hegemonion de la civilizita kaj civilizota mondo. laŭ tiuj tradiciaj pensmanieroj fantaziplenaj, kvankam vivante meze en la tiel civilizitaj socioj, ili tre stulte opiniis, ke ili domaĝos nek sangon de la homoj nek detruon de la landoj, se ili nur povus ordoni la mondon. por tiu celo ili fabrikadis pli grandskale la mortigilojn kaj detruilojn. popoloj, kiuj estis tiamaniere edukitaj, ke ili tutkore kredis la legendon, ke napoleono estis la heroo de la homaro, subtenadis tiun sencelan agadon de siaj registaroj. tuta diseco de la nacioj aŭ profunda kontraŭstarado de la ŝtatoj pravigis la reciprokan konkuron, kaj tia konkuro estis laŭdata, eĉ ŝatata, kiel la instigilo por prosperigi sin. s-ro darwin bonvolis elpensi la doktrinon, kiu pravigas konkuradon, en kiu la fortulo nepre venkos la malfortulon.

tiu ĉi stato efikis por disigi la eŭropanojn, sed ĝi ankaŭ neeviteble venigis al ili tiun ideon, ke pro sia oportuneco politika, komerca, scienca, literatura ktp., oni ja bezonas komunan lingvon, t.e. la mondlingvon, kiu ebligos al la civilizitaj eŭropanoj interkomunikiĝi reciproke. ĝis la komenco de la 20a jarcento, en eŭropo aperis kelkcentoj da projektoj mondlingvaj. en tiu duoninsulo nomata eŭropo, la nacioj estis disigitaj per retsimilaj landlimoj, kaj trapasante iliajn maŝojn, ordinaraĵoj apenaŭ povis interkomunikiĝi kun alilandanoj. tiu ĉi maloportuneco estis okulfrapa por ĉiuj.

en bjalistoko, kie naskiĝis ludoviko, la stato estis pli komplika. rusoj kun siaj ortodoksaj preĝejoj paroladis ruse. poloj kun siaj katolikaj preĝejoj, pole. germanoj kun siaj luteraj preĝejoj, germane. judoj kun siaj sinagogoj, jide. ktp.

nature, ili ne povis interkompreniĝi reciproke, kaj pli bedaŭrinde, ili eĉ ne havis volon tion fari. rusoj estis la regantoj, la potenculoj. la ceteraj estis regatoj, kaj escepte la germanojn, malfortuloj, kaj sekvante tiun memmizerigan kutimon de la malfortuloj, ili bataladis inter si, tiel profitigante la fortulojn. Inter ili, judoj, kun sia religio, siaj specialaj vestoj, kutimoj, kuirmanieroj kaj kalendaro, ĉiam subpremataj de la registaro, estis laj plej mizeraj.

la patro de ludoviko havis asimilisman tendencon. en lia hejmo, oni aŭdis, krom la jidan lingvon, ankaŭ la rusan, kaj la registaro favore rilatis al tio. sed ne multaj iris laŭ tiu vojo kaj la stato de judoj ĉiam restis malforta. ankoraŭ juna, ludoviko tre frue rimarkis tiun humiligan faktoron, kaj venis al li la ideo, ke se la loĝantaro havus komunan lingvon, tiam nuna stato – plena de malamikeco – eble malaperus. sed kiel judo, al li ne estis sufiĉe, ke li povu interpacigi la diversajn gentojn en sia naskiĝurbo. la judoj ja vivadas disigitaj sur la tuta terglobo. ili ĉiuj apartenas al unu gento, ĉiuj same estas alŝatataj de aligentantoj, sed ili tamen ne uzas saman lingvon. laŭ sia loĝloko iliaj lingvoj diferencas, kaj ili, samgentaj judoj, ne povas interkompreniĝi reciproke. judoj,

loĝantaj ĉi tie en la okcidenta rusujo, uzadas la jidan, kiu evoluis el la germana lingvo kaj fariĝis memstara kun aparta karaktero. tiutempe ĝi tamen ne estis sufiĉe polurita, kaj ankoraŭ ne posedis propran literaturon, nek sian gramatikon. ludoviko ekvolis havigi al judoj komunan lingvon, kiu permesos al ili reciprokan interkomunikon.

la interpacigo de diversaj gentoj, kiuj loĝas kunigite en sama loko, kaj la unuigo de judoj, kiuj loĝas disigitaj sur la tuta terglobo, tiuj ĉi du unuavice diverĝaj celoj povis unuiĝi kreskante je la ideo de interpacigo kaj unuigo de la tuta homaro. al la naiva kapo de infano, tio ĉi ŝajnis la plej bona vojo por iri. kaj tamen, la maturaj kapoj, kiuj estas jam tiel venenitaj de la civilizviruso, neniam povas konsenti sekvi tian vojon. ili nur fanfaronas pri sia atingo, neniam atentante la malegalojn kaj kontraŭstarojn, kiuj troviĝas inter nacioj, kaj kredas, ke la suvereneco de ilia ŝtato estas pli ol sanktaĵo, kaj la milito estas ne malhavebla malbono, kiu alportas tamen ian bonon. ili ja ĉiuj opinias, ke tia revo estas utopio, kaj neniam aŭskultas la voĉon de naivuloj, kvankam la klerismo kaj la humanismo ja klare antaŭvidas tian staton nepre havindan. sed kiel ajn maturuloj priridus, kiel ajn la socio ridindigus ĝin, ni ja konas unu viron, kiu klopodadis realigi tiun revon. li elpensis artan lingvon, kiel rimedon por plenumi tiun revon, kaj dediĉis sian tutan vivon por popularigi ĝin. ne malmultaj biografoj diras, ke li sukcesis fari kaj disvastigi artan lingvon, sed la mondo, tro okupita por ekspluati siajn fantaziojn, ankoraŭ ne agnoskas lian sukceson. ili diradas, ke la komuna lingvo malfortigos la naciajn lingvojn, kaj ke, se mondlingvo realiĝos, oni devos forlasi siajn naciajn lingvojn tiel karajn, kaj sekve tiuj karegaj ŝtatoj tiel suverenaj devos malaperi. Ili ankoraŭ ne volas eligi sin el tiu anakronisma kadro, kaj nur intencas subteni tiun fantazion jam ordoni kaj regi la tutan mondon per la minaco de siaj nukleaj mortigiloj.

kiamaniere lingvon oni artefaras?

(...)

judaj infanoj komencas lerni tre frue la unuajn kvin librojn de la hebrea biblio. trijare ludoviko laŭte voĉlegis la librojn en la originalo. ĉi lingvo, saturita per malnovaj historio kaj tradicio, estas la interkomunikilo inter antikvaj judoj kaj ilia dio. ĝi povus esti tre grava kaj grandioza parolilo, sed al ĝi tute mankas la esprimoj por moderna vivo. – probable juna ludoviko ne pensis tiel, kiel ni nun rezonas, sed, ĝenerale dirite, la antikva hebrea lingvo neniam taŭgos esti komuna lingvo de nuna mondo, kvankam ĝi estis la fundamento, sur kiu poste fariĝis unu el la novaj „naciaj“ lingvoj de la 20a jarcento.

flanke de la jida, kiu estis la komuna lingvo de tieaj judoj, lia patro uzadis ankaŭ la rusan en sia hejmo. La kvinjara ludoviko jam scipovis legi kaj skribi ruse. li amis tiun ĉi lingvon elkore, kaj revadis fariĝis iam rusa poeto. naŭjara, li eniris gimnazion, sed tuj malsaniĝis, eliris de ĝi, kaj venontan jaron denove eniris. dum tiu intertempo li verkis 5-aktan tragedion ruse, kiu verŝajne⁸⁴ rakontis pri la turo babel. imitante sian patron, li amis kaj admiris la lingvon kaj la kulturon rusajn. sed rusujo, kiun li tiutempe adoris, neniam bonvolis reciproki al li la amon, kiun li oferis. male, ĝi vidadis en li nur la malŝatatan civitanon. bedaŭrinde, tie regis nur la politikaj rilatoj, kaj dank' al la perfekta manko de homeca rilatiĝo, la malfortuloj restis ĉiam kiel subuloj, kiom ajn ili adorus la lingvon kaj kulturon de la fortuloj. la regantoj penis altrudi siajn lingvon kaj kulturon al la malfortuloj nur por montri sian superecon.

⁸⁴ Jen unuafaĵe iu aŭtoro de LLZ-biografio dubas pri tiu epizodo.

lia patro estis instruisto de modernaj lingvoj. de frua tempo ludoviko jam scipovis ankaŭ la germanan kaj la francan sufiĉe bone. En tiu tempo, scio de la germana estis alta taksata kaj legado de germanaj libroj estis plej ŝatata okupo de klerismaj judoj. La franca lingvo tiutempe ĝuis ian prestiĝon de kvazaŭa mondlingvo, dank' al tiu heroo napoleono, en la rilato de ŝtatopolitiko, kaj en rusujo kaj polujo, scio de la franca estis nepre postulata en la supera klaso. sed oni tamen ne povus vidi en tiuj lingvoj la interkomprenilon inter diversaj gentoj. jes, ĝenerale dirite, nenia nacia lingvo povos esti komuna lingvo, ĉar ĉiu ja estas plenplene saturita de siaj fieroj naciaj, kiuj humiligos alinacianojn.

kiam ludoviko estis 13-jara, la familio translokiĝis al varsovio. ĉi tie li akiris la polan, kiu poste iel helpis lin por fari sian lingvon. sed tiu lingvo, kiu priploras sian perditan patrolandon kaj ĉiam revadas pri ĝia restaŭro, nature ne taŭgas esti komune-homa lingvo.

(...)

En 1984 aperis 'La vivo de D-ro L.L. Zamenhof en bildoj' de Henk Thien. En 1986 Jeremi Gishron publikigis en Israelo en Esperanto sian disertacion 'Lingvo kaj religio' en formo de studo pri la frua esperantismo kun speciala atento al L.L. Zamenhof. En 1987 Tomasz Wiśniewski eldonis en Bjalistoko pollingvan libreton pri Ludwik Zamenhof.

En 1997 aperis en Ruslando 'Soci-politikaj konceptoj de L.L. Zamenhof' de B. Zozulja, kaj en Francio A. Cherpillod verkis 'L.L. Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj' kaj 'Zamenhof kaj judismo' (ambaŭ 1997)

René Centassi / Henri Masson: La Homo, kiu defiis Babelon (2001) ⁸⁵

Enkondukaj rimarkoj: En 1995 aperis en Francio la libro ‚L’homme qui a défié Babel’ de René Centassi kaj Henri Masson. Centassi estis iama ĉefredaktoro de Agence France-Presse en Parizo kaj Masson estas konata franca esperantisto. La Esperanto-traduko, prizorgita de Georges Lagrange kaj Philippe Combot, estis eldonita sub la titolo ‚La homo kiu defiis Babelon’ ĉe L’Harmattan en 2001. Kvankam la teksto estas ĝuinde flue legebla, ĉi tiu biografio ne alportis en principo novan dimension en la Zamenhof-biografado, sed ripetis pli malpli la konatajn aferojn, skribitajn de antaŭaj biografioj. Mi intence diras aferojn kaj ne faktojn, ĉar ankaŭ en la biografio de Centassi/Masson la nebulo super diversaj tradiciaj legendoj ne leviĝis, kaj mankas fontindikoj, kiel kutime. La hagiografian karakteron de la biografio de Zamenhof ne solvas ankaŭ la multnombraj piednotoj kaj prilaboritaj historiaj okazaĵoj, kiujn la aŭtoroj integris. La inventitaj epizodoj pri la babelturo sur la bjalistoka urboplaco restis konservita, same Maria, la servistino de la zamenhofa familio, kiu estis enkondukita de iu antaŭa aŭtoro. Nova elpensado pri la „onklo Jozefo“, kiu adiaŭis la Zamenhofojn, kiam ili translokiĝis de Bjalistoko al Varsovio kaj kiu korespondadis kun Ludoviko, riĉigas la libron. Oni scias nur, ke Marko Zamenhof havis pli aĝan fraton –

⁸⁵ Centassi, René / Masson, Henri: La Homo, kiu defiis Babelon. L’Harmattan. Paris 2001. 293 p.

Josef Wolf, detaloj ne estas konataj. Ĉu Ludoviko vere legis la biblion kun sia fratineto Sarah, kiu mortis en la aĝo de dek jaroj, oni povas nur supozi. LLZ konfirmis en sia hilelismo de 1901, ke ĉiuj hebreaj infanoj legas la biblion, kaj kiel mi eksciis en alia libro pri judismo tio okazas ekde la kvina jaraĝo. Interesa estas la komparo de Bjalistoko de Zamenhof kun la urbo Rusĉuk de Elias Canetti, kiu ankaŭ estis speco de lingvaabelo, sed en Balkanio, priskribita en la libro ‚Die gerettete Zunge‘.

En la bibliografio estas listigitaj pli malpli ĉiuj gravaj verkoj, kiuj ĝis nun iel traktis la vivon kaj historion de Zamenhof, do supozeble la aŭtoroj, ĉefe Centassi, legis kaj digestis tiujn materialojn. Tamen mankas indiko pri PVZ kaj Originalaro 1998-91 (de ludovikito). En privata korespondaĵo kun mi Masson konfesis, ke Centassi estis iom malpreciza rilate fontojn kaj ke li verŝajne parte apogis sin sur la libro de Vitaliano Lamberti, ‚Una voce per il mondo. Lejzer Zamenhof il creatore dell’Esperanto‘, kiu aperis en Milano en 1991. Konsultante du elstarajn italajn esperantistojn pri ilia opinio pri la verko de Lamberti, kiu fakte celas esti romano, ne pura biografio, mi ricevis de la unua la respondon, ke temas pri libro ‚daŭre legata de italaj esperantistoj kaj donacata al neesperantistoj, kaj ke la ĝenerale aŭdebla juĝo estas: tre bona biografio, eble iom tro patosa kaj romantika.‘ La alia italo konfirmis, ke la libro de Lamberti ‚sekvas la saman kanvason kaj la saman iom legendecan laŭdadon.‘ Do, kvankam ilia libro estas tre leginda, ankaŭ Centassi/Masson iusence ripetis la ‚eraron‘, miksante en sia biografio historiajn faktojn kun elementoj de romano/fabelo. Por akiri pli da prestiĝo, la libro ricevis antaŭparolojn de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof kaj Umberto Eco. En la apendico estas menciitaj eminentuloj, kiuj pozitive pritaksis Esperanton. La dramo en tiu tuta libroprojekto estis, ke Centassi forpasis komence de 1998, tiel ke multaj historiografiaj detaloj en la Esperanto-versio devis resti neprilaboritaj.

Babelo sur la bazarplaco

Kun la frunto apogita sur la maldekstra manplato, Lazaro estas klinita super sia kajero. Li seriozege penas. En apuda ĉambro, liaj tri fratinetoj krie ludas, sed la knabeto tute ne atentigas pri ilia bruaĉo. Per klopodema kaligrafio, li desegnas sur la blanka papero la unuajn vortojn de la naskata verko: ‚Kvinakta Tragedio, de Lazaro Zamenhof.‘ Li duonlaŭte relegas, memkontenta.

La titolo? Ne urĝas. Lazaro jam imagis plurajn. Li elektos poste, kiam la intrigo estos klare konstruita en lia kapo, kiam la verko estos jam akirinta sian formon. Nun. La ĉefaĵo estas la temo, tiu Babelturo, kiun la infano decidis konstruigi sur la bazarplaco de Bjalistoko fare de la loĝantaro de la urbo.

(...)

Malgraŭ sia tre juna aĝo, Lazaro estis forte impresita de la Genezo, kiun li legis kun sia fratino Sarah, unu jaron pli juna ol li. La versikloj pri la Babelturo senĉese obsedadis lin. Ĉar por li Babelo kaj ĝia neniam finkonstruita zigurato ne troviĝas je la mondfino. Babelo estas ĉi tie, apud li, en lia vivo mem, en la urbo, kie li naskiĝis.

La nord-orienta parto de Pollando estas sub rusa regado de jam duonjarcento. Fondita de bojaro en la 15a jarcento, la vilaĝo Bjalistoko (pollingve Bialystok)⁸⁶ iom post iom

⁸⁶ En la teksto sen l.

altiris multajn nobelajn rusajn familiojn, poste magnatojn de la teksta industrio.⁸⁷ Ĝi travivis tiel brilan periodon,⁸⁸ ke la caro Aleksandro la Unua tie konstruigis somerrestadejon. Bedaŭrinde pliampleksigante sian industrion, tiu gastigema loko transformiĝis en aktivan sed malbelegan urbeton, kun kotaj kaj fetoraj stratoj, kaj ĝia loĝantaro, submetata al neelteneblaj vivkondiĉoj, sinkis en malĝojon.⁸⁹

Meze de la 19a jarcento, la urbo Bjalistoko, antaŭ nelonge nomata „Versajlo de Podlaĥio“, nun havas la malpli gloran alnomon „Manĉestro de la Nordo“. Kvankam ili elportas la samajn suferojn, la saman mizeron, la tridek mil loĝantoj vivas en malamikema, timoplena kaj malfidema etoso: Bjalistoko estas bataalkampo por religiaj, gentaj kaj lingvaj konfliktoj.

La Poloj estas malplej multaj, maksimume 3000, ĉiuj romkatolikaj. La Rusoj kaj Belorusoj, ortodoksuloj, estas 4000, kaj la Germanoj, protestantoj, 6000. La judoj estas plej multnombraj, ĉirkaŭ 18000. En Bjalistoko, kvin lingvoj estas parolataj: la rusa, oficiala lingvo, la belorusa, la pola, la germana kaj la jida, kaj eĉ sesa, la hebrea en la sinagogo. Ĉiu gento sin esprimas en sia gepatra lingvo kaj nepre rifuzas uzi tiun de la aliaj. Ĉia komunikado estas fakte neebla, ĉar ĉiu genta aŭ kultura grupo enfermiĝas en siaj kutimoj kaj sia fiero. La rilatoj estas malfacile streĉaj.

La homoj unu la alian malamegas, persekutas, interŝanĝas malbenojn, insultojn, ŝtonojn. Sur la stratoj, en la butikoj, kvereloj eksplodas pro la plej eta preteksto. Ĉiutage, ĉie estas koncerto de insultoj, de ofendoj, pafadoj de krudaj esprimoj, senbridigo de disputoj. Kaj kiel komuna lingvo, la batoj.

Kvankam plej multaj, la Judoj estas la celo de ĉies malestimo. Ĉu oni estas Ruso, Polo aŭ Germano, oni ĉiam interkonsentas, se temas pri la Judo. Ĉi tiu spertas nur subpremojn, humiligajn kaj ofendajn vortojn. Ne maloftas, ke gojo kraĉas, se pasas Judo, ke militisto rikanante puŝpelas judan maljunulon, por vidi lin falegi sur la pavimon.

En tiu etoso de reciproka malamikeco venas en la mondon Lazaro Zamenhof, en izraelida hejmo, la 15an de Decembro 1859.

Juna Sagitario el la tria triono. Li portas en si, diros la astrologoj, dignon, lojalecon, logikemon, idealismon, sindonemon, deziron je reformoj, decidemon, noblan kaj entuziasman naturon, kapablon gvidi la homojn, novajn ideojn, viglan inteligenton, klaran vidon pri la estonteco...⁹⁰

Ĉiujn tiujn kvalitojn oni ja rekonos en Lazaro dum lia tuta vivo. Ekzempla modesteco ilin akompanos. Tia estos la fidela portreto de Zamenhof en lia maturaĝo, kiam li estos finrealiginta sian noblan kaj aŭdacan projekton, naskiĝintan en la koro de knabeto.

Probable unu el la plej mirindaj aventuroj en la historio de la homaro.

(...)

⁸⁷ Ĉi tiu kronologio estas iom konfuzita: en la historio de Bjalistoko estis sinsekve unue litovaj, poste polaj (polaj-litovaj) nobeloj, poste prusoj/germanoj, kaj nur ekde 1807 la rusaj aŭtokratuloj ekregadis la urbon. Tiam regis caro Aleksandro I., kiu pagis al Prusujo 20 223 arĝentaj rubloj por Bjalistoko.

⁸⁸ Malfacile diri, kiu estis la plej brila periodo de Bjalistoko – supozeble kiam ĝin posedis polaj nobeloj (Branicki/Potocki), tiam ĝi estis nomata „Versajlo de Pollando“. La periodo sub la rusa regado kaj kun la multegaj judoj estis ege malfacila periodo. La industrio en Bjalistoko estis surb la kontrolo de germanoj, almenaŭ ĝis certa tempo.

⁸⁹ Bone, sed oni klare ekspliku la cirkonstancojn de tiuj problemoj.

⁹⁰ Temas pri „fakultativa“ klarigo de Centassi/Masson.

Profunde influita de la rusa kulturo, Markus Zamenhof transdonos sian pasion al sia multnombra idaro: tri filinoj, Sarah, Fania kaj Aŭgusta, poste dua filo, Felikso, en 1868, kaj kvar pliaj infanoj en la postaj jaroj. Henriko, Leono, Aleksandro kaj Ida. Inter ĉiuj lingvoj, Lazaro ĉiam favoros tiun de sia edukado, kaj fakte en la rusa li verkas tiun naivan babelan tragedion, kie respeguliĝas la animo de atentema, sentema, klarvida infano, kiu jam tre juna korpreme malkovras la spektaklon de la homa socio.

(...)

Tro malpacience sciavida por resti pasiva, Lazaro frue lernas legi kaj skribi kaj tute nature interesiĝas pri la lingvoj kaj ties diverseco. En lia kazo, scipovi kvar lingvojn en la aĝo de dek jaroj – la rusan kaj la polan hejme kaj lerneje, la jidan en sia kvartalo kaj la hebrean por la diservoj – estas neniel eksterordinare. Poste lia patro instruos al li la lgermanan kaj la francan. Lazaro senpene regos la lingvon de Goeto. Inverse, la parola praktikado de tiu de Moliero ĉiam estos por la ia ĝeno: „La lingvon francan mi legas libere sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ ok aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie.“ Inter ili la latinan, la helenan, la angla kaj la litovan.

(...)

La lingvajn barojn, la ĵaluzecon de ili kaŭzatan, la neeblan egalecon de la idiomoj malkovras la vigla menso de la knabeto sur la bazarplaco de Bjalistoko.

Lazaro tien iras kiel eble plej ofte. Li ŝatas ĝian vivplenon. La bruojn, la kolorojn, la odorojn. La kriaĉoj de la komercistoj, la ĉarlatanaĵoj de la bazaruloj, la insultoj ĉie blekataj, ĉio estas por li interesa kaj konsiderinda, eĉ se li kelkfoje kaptas nur unuopajn vortojn aŭ nekompreneblajn intonaciojn. Tie la vendostabloj similas unu la alian laŭ siaj formoj, laŭ la nutraĵoj kaj varoj, kiuj tie amasiĝas. Sed malantaŭ la benkoj staras homoj, kiuj tre malsimilas unu de la aliaj. Ili estas fieraj, arogantaj, enŝlositaj en la propra identeco. Lazaro observas ilian agmanieron kaj provas enpenetri ties sekreton. La pola vilaĝano prilaŭdas la kvaliton de siaj fromaĝoj en lingvo, kiun lia najbaro, la juda merceristo, provas plenvoĉe superlaŭti en la jida. De la fruktoj kaj legomoj, kiujn li proponas, la belorusa kamparano volas scii nur la nomojn, kiujn li lernis sur sia tero, en sia infanaĝo. Kial ekzistus aliaj nomoj ? En ĉiu pasejo la imperiaj soldatoj raŭkiĝas marĉandante en la rusa. Plej multaj el la komercistoj signas, ke ili ne komprenas. Aŭ eble ili ŝajnigas ne kompreni. Kaj kiam eksplodas diskuto, kiam ĉiu enmikisiĝas, estas ĝenerala miksbruaĉo, en kiu la plej aĉaj ofendoj kaj krudaĵoj ĉiulingve ŝprucas. Nur la almuzuloj silentas. Ili etendas la manon. Gesta lingvo de la mizero, antaŭ kiu ĉiuj lingvaj baroj fine cedas. Kiom da aferoj Lazaro lernas sur la bazarplaco !...

Kiom da fojoj liaj gepatroj ripetis al li, ke ĉiuj homoj estas fratoj !... Nu rigardante ĉirkaŭ si Lazaro konstatis, ke tio ne estas vera:

„Sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas“, li skribis en 1896 al rusa korespondanto, Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko. „Ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj, ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi „doloro pro la mondo“ ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la „grandaĝaj“ posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.“

La malbonon de dividiĝo kaj de malamo. Tiun homan dividiĝon neniu povas tiel akre suferi kiel infano de la juda kvartalo: „La necesecon de lingvo sennacia, neŭtrale homa, neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo, kiu estas devigata preĝi al Dio en jam longe mortinta lingvo, ricevas sian edukon kaj instruadon en lingvo de popolo, kiu lin

forpuŝas, havas samsuferantojn en la tuta mondo kaj ne povas kun ili kompreniĝadi...“ oni legas en letero de Lazaro Zamenhof al la advokato Alfred Michaux en Februaro 1905. Lia judeco estas „la ĉefa kaŭzo, kial [li] de la plej frua infaneco fordonis [sin] tutan al unu ĉefa ideo kaj revo – al la revo pri unuiĝo de la homaro.“ Tiam la knabeto komencas revii pri „tia feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plenrajte al ĉiuj siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unuj la aliajn.“

(...)

Intertempe, la plejaĝa filo de la Zamenhofa familio faras, kion faras multaj samaĝaj infanoj: li ĵongle ludas per la vortoj, per la lingvoj, inversante silabojn, komunikante kun siaj kamaradoj per sekretaj kodoj.

Nekonscie, Lazaro preparas sian estontecon, estante elstara en tiaj ludekzercoj. Li tute ne suspektas, ke simpla lernejana ludo forĝas en li la bazojn de cerba gimnastiko, per kiu lia logikema menso baldaŭ firme plukonstruos. Dum unu aŭ du jaroj, la juna Lazaro fordonas sin al tiu bagatela manio, sen iu ajn kaŝpenso. Liaj studoj ne suferas pro tio. Markus Zamenhof, cetere, ion tian ne tolerus. Lazaro estas – kaj daŭre estos – la unua en sia klaso. Modli la vortojn kiel oni deziras, ilin knedi, dispremi, dishaki, pisti, ĉio tio estas ja pasiiga. Tio estas por tiel diri la „vaganta lernejo“ de brila lernanto, nenio plia.

Tamen lernejo. Morgaŭ ĝi helpos lin por disvolvi ideon, kiu jam trotras en lia kapo: ĉu lingvo planita ne kunhelpus al la proksimiĝo de la popoloj, al kio iu ajn nacia lingvo, ĉefe se altrudite kiel la rusa en Bjalistoko, neniam povos pretendi ?

(...)

La Libro ‚La Familio Zamenhof‘ de Zofia Banet-Fornalowa, eldonita ĉe LF-koop en la jaro 2000, kun reviziita represo en 2001, publikigis detalajn biografiajn studojn pri la zamenhofaj familianoj, kun la konsidero de foraj parencoj ĝis la nuntempo. La libro inkluzivas ankaŭ portreton pri L.L. Zamenhof mem, en stilo multe tro emocia. Pli malpli samtempe estis publikigita la detala esploraĵo pri la ‚Historio de Esperanto-movado en Bjalistoko‘ de la sama aŭtorino, kiu detale dokumentas la sorton de Esperanto en la naskiĝurbo de Zamenhof. En 2003 sekvis la libro ‚La Zamenhof-strato‘ de Roman Dobrzyński, en formo de evidente iom artefarite protokolitaj konversacioj kun Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, kun memoroj pri ties avo kaj la profesia kariero de Zaleski mem. Ĉi tiu laŭte kaj grandparte senkritike propagandita kaj sukcese merkatingita libro trovis tradukon en multaj nacilingvoj.

En 2004 iu J. Skalicka verkis pri ‚Politikaj kaj religiaj ideoj de Zamenhof‘ (Toruń).

A. Cherpillod daŭrigis sian zamenhofologian studadon pere de ‚Les trois rêves humanistes du docteur Zamenhof‘ en la franca lingvo (2007).

Pri la biografio de Zamenhof science okupiĝas ankaŭ la pol-franca sociologo Walter Źelazny kaj la rusa eksinĝeniero, verkanto-tradukanto kaj Esperanto-jurnalisto Aleksandr Korĵenkov en kunlaboro kun Halina Gorecka en Kaliningrado. Andreas Künzli, slavista filologo kaj historiisto, verkis en 2008/09 detalan biografion pri LLZ en la germana lingvo, kiu estas publikigota. Ne forgesindaj estas ankaŭ la ĉi-temaj kontribuajoj de Ulrich Lins, Krister Kiselmann kaj iu Michel Clément (pri la homaranismo), eble ankaŭ de Renato Corsetti kaj Detlev Blanke (ekzemple pri la interna ideo), kaj eble aliaj. Ankaŭ en Bjalistoko kaj Grodno oni okupiĝas pri la biografio de Zamenhof.

Kelkaj konkludoj

1. La aŭtoroj de la LLZ-biografioj kutime baziĝis je la antaŭe aperintaj biografioj, kutime ripetante (kaŝkopiante) kion skribis la antaŭuloj, aldonante krom iuj novaj informoj ankaŭ kelkajn elpensaĵojn kaj proprajn interpretojn (hagiografia, legendeca, romaneca tendenco).

2. Ĝenerale mankas sciencenco, kritika prilumado de la aferoj, serioza piednotado, fontindikado, dum verkindikoj tamen kelkfoje ekzistas. Abundas fakta malekzakteco, troviĝas multaj malklaraĵoj kaj eraroj. Kvankam sendube fakuloj sur siaj profesiaj kampoj, al la biografioj ŝajne iom mankis la severaj profesiecaj rimedoj kaj spertoj de la historiografia aŭ biografia metio. La tasko verki LLZ-biografion estis akceptita pro diversaj plej ofte subjektivaj motivoj (ekzemple jen por omaĝi la ĵus forpasintan majstron, jen ĉar liaj sociaj ideoj estis, pro ideologiaj kaŭzoj, rifuzindaj, jen pro jubilea okazo jen pro mendo de biografio, jen pro „amo“ al la afero, jen pro la bjalistoka deveno de LLZ, jen pro la atento al la problemo de la komuna lingvo aŭ alia instigo).

3. En ĉiuj biografioj Bjalistoko nepre aperas kiel ‚negativa‘ urbo kun malfacila historio pro la politika subpremado, socia (intergenta) malamo kaj ekonomia malriĉeco (de la judoj). Mankas do pli diferencigita bildo de la historio kaj de la problemoj de Bjalistoko en la tempo de Zamenhof, en antaŭa kaj posta tempoj.

4. La judeco de LLZ ja estas en ĉiuj biografioj ĝenerale menciita, sed sen enprofundiĝo (aŭ sen granda ‚entuziasmo‘). La esploroj de Maimon kaj Holzhaus estas apenaŭ atentataj, kaj la ĉi-rilata historia fono ne estas objektivite reflektata. Malgraŭ okulfrapaj kaj ne prisilentindaj negativaj aspektoj, la juda dimensio de Bjalistoko ricevas nenian pozitivan pritakson. Escepte de la okulfrapa prisilento de la judeco de LLZ en la ‚Enciklopedio de Eo‘ kaj de la dubindaj kazoj menciitaj de Maimon, rektaj antisemitismaj tendencoj tamen ne estas senteblaj en tiuj biografioj. Kvankam la judeco/hebreeco de LLZ do estas ĝenerale menciita kaj emfazita, estas tamen mirinde, ke la Esperanto-propagandistoj insiste kutimas, ĝis nun, prezenti Zamenhofon kiel ‚polon‘ (polan kuraciston, polan lingviston ktp),⁹¹ kvankam LLZ tute klare distancigis sin de la poleco.⁹²

5. Ne mankis provoj marksisme bazite interpreti la problemojn de la tempo de Zamenhof, inter alie far Drezen, kaj formale, sed ne fanatike, Ziółkowska kaj Kraŝko, sed perplekse ankaŭ ĉe la svisa interlingvisto Carlevaro, kiel montrite en la monografio ‚Esperanto en Perspektivo‘.

6. La lingvaĵo kaj stilo ofte ne estas tre glata; la libroj estis verkitaj evidente tro haste kaj rapide.

7. La tradukitaj biografioj (precipe Ziółkowska, Centassi/Masson) estas lingve pli bonaj ol la originale verkitaj.

Do, la ĉapitro pri Bjalistoko en la LLZ-biografioj restas kvankam ne seninteresa, tamen ŝabloneca, kliŝeca, legendeca, simpleca, eĉ kiĉa kaj iom primitiva.

⁹¹ Plej aktuale ekzemple: vortaro Matthias/Weidmann 08, recenzo Dahlenburg en IntI 69/2008, Eo-rezolucio de la neŭŝatela parlamento 09. Pri la multnombraj informiloj kaj flugfolioj pri Esperanto mi tute silentu.

⁹² vd. mian artikolon pri la identeco de LLZ en Literatura Foiro, 09.

Necesas do, el scienca sinteno, grandskala kritiko de la ĝisnunaj LLZ-biografioj. Por verki vere novan biografion necesus verŝajne kompleta prilaborado de la ĝisnunaj verkoj, kun serioza kontrolado de la faktoj, laŭ kutimaj sciencaj normoj, kun profunda traktado de la unuopaj ĉapitroj. Tio necesigus tre ekzaktan relegadon de la verkaro de LLZ kaj eventuale ankaŭ novajn arkivajn studojn en lokoj, kie Zamenhof estis, vivis, laboris. Necesas fari liston de ĉiuj strangaĵoj por sisteme ilin kontroli kaj prilabori, tiom kiom eblas. Kompreneble tio estas fortostreĉo, kiun ne eblas fari sen oficiala projekto kun mona budĝeto, almenaŭ por kovri elspezojn. Sen tia klopodo oni devas timi, ke ankaŭ estontaj biografioj restos samtipaj, ke la biografoj ripetos la samajn erarojn kaj ke la legantoj ricevos pri Zamenhof kaj la Esperanto-historio la konfirmon de tio, kion ili ĉiam kredadis.